Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 27 — trimonata — ISSN 1013-2031 **3/97**

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Redaktoro: Jozefo NÉMETH

Vicredaktoro: Katalin SMIDÉLIUSZ

Kunlaborantoj: Stefan MacGILL, Johano KIRSCH, Françoise NOIREAU, Atilio ORELLANA ROJAS kaj Franz-Georg RÖSSLER

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): R. Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende

IPR

Redaktejo: NÉMETH József
HU-8500 PÁPA, Kilián ltp. 75/9
☎ + 36-89-315-836, 💻 nlalt@konyvtar.c3.hu

Presado: Flandra Esperanto Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

Enhavo

Alan J. Bishop: *La eduksistemo en Aŭstralio* 1
ILEI dum UK, ILEI-Konferenco, Konferencaj dokumentoj (M. Belošević) 3
Bernard Golden: *Instruado de bona stilo kun konsekvenca vortordo* 12
Blazio Vaha: *Simplaj komplikaĵoj* 15
Kelkaj eldonaĵoj de ILEI (smg) 17
Ilona Koutny: *Profesoro Szerdahelyi forpasis antaŭ 10 jaroj* 25
Renato Corsetti: *Psikolingvistika esploro pri lernado de E-o* 26
Por via notlibro 27
El la landoj kaj sekcioj (AR, AU, FI, FR, IR, JP, HR, PL, RU, CH, UA, US) 28
Renée Triolle: *Inventemaj investoj* 35
Postparolo (J.N.) 36

Estraro de la Ligo

Prezidanto: d-ro Duncan Charters, 25 Elsah Hills Drive, Elsah, IL 62028-9750 Usono; tel. 1-618-374-2453, fakso: 1-618-374-5465. Rete:charters@prin.edu. *Kunordigo, instruista trejnado.*

Vicprezidanto: Brunetto Casini, Casella Postale 213, IT-56100 Pisa, Italio tel. 39 50/48 670, fakso 39 50/50 05 85. Rete: edistudio@sirius.pisa.it *Planado.*

Sekretario: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Tel. (385 1) 576092. Rete: marija.belosevic@public.srce.hr. *Landaj sekcioj, membro-varbado, rilatoj kun UEA kaj la movado, servoj al instruistoj.*

Kasisto: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby. Tel. (46 415) 501 52. *Financo, konferencaj financoj. Membraro.*

Vic-sekretario: Prof. Zhang Danchen, North Area 14-dong, 34-hao, Huazhong Normal Univ., CN-430070 Wuhan, Ĉinio. Internet: dedhea@public.wh.hb.cn *Azia agado, ekzamenoj en Ĉinio kaj Azio.*

Membro: Mag. Atilio Orellana Rojas, Casilla de Correo 1428, AR-5000 Córdoba, Argentino. Tel. kaj fakso +54-51-520065. *Konferencoj, ekzamenoj.*

Membro: Raymond Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende, Belgio, Tel. (32 59) 502708. *Eksteraj rilatoj.*

Estrara komisiito: Prof. Ronald J. Glossop, 8894 Berkay Ave., Jennings, MO 63136, Usono. Tel. (314) 869-2303. Rete: rglosso@siue.edu *Instruado de infanoj.*

Estrara komisiito: Zsuzsa Barcsay, Bem Rakpart 25/B, HU-1011 Budapest, Hungario. Tel. (36 1) 201-2342. *Gimnazio de ILEI.*

Estrara komisiito: Stefan MacGill, Fácán köz 9/2, HU-2030 Érd, Hungario. Tel. (36 23) 363-280. *Eldonado*

Observanto (UEA): Renée Triolle, 4 impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio

ALAN J. BISHOP:

La eduksistemo en Aŭstralio

Sektoroj kaj ŝtatoj

En Aŭstralio estas du sektoroj pri edukado: la registara kaj la neregistara. Respondeco por eduki infanojn restas ĉe Ŝtataj kaj Teritoriaj registaroj, kiuj devas provizi edukadon por ĉiuj infanoj de 6-jaraj ĝis 15-jaraj (mi uzos la vorton 'ŝtatoj' por signifi Ŝtatoj kaj Teritorioj). Tamen gepatroj povas elekti neregistarajn lernejojn por siaj infanoj, kaj multaj faras tion pro religiaj, kulturaj kaj aliaj kialoj.

La nacia registaro havas la respondecon por decidi naciajn politikojn, kaj por negoci la similecojn de la provizoj de la ŝtataj sistemoj, ekzemple, pri ATSI studentoj (*Aboriginal and Torres Straits Islanders* = indiĝenoj de la insuloj norde de Aŭstralio) kaj pri malavantaĝaj studentoj. La registaro decidas ne sola, sed kun multaj diversaj konsilgrupoj. Grave estas, ke la nacia registaro provizas nur financon, politikojn kaj konsilojn, sed ne respondecas pri la provizo de la konkreta edukado en la lernejoj.



En ĉiu ŝtato instancoj preskribas kelkajn edukadajn aferojn, ĉefe studobjektojn, ekzamenojn, kursakreditaĵon, financasignadon, kaj ankaŭ la dungadon, asignadon, kaj la profesian formadon de la instruistoj. Do la respondeco pri la efektiva eduko en la lernejoj restas en la ŝtatoj.

Pro tio estas kelkaj malsimilaĵoj pri edukado inter la ŝtatoj, kaj ili estas fontoj de oftaj disputoj inter la ŝtatoj, kaj inter ili kaj la nacia registaro. Ofte edukado en Aŭstralio, laŭ mi, suferas pro tio. Ĉar la eduksistemo multe kostas, la politikistoj kutime uzas ĝin kiel 'politikan piedpilkon'. Ĉiu grupo de politikistoj prenas monon el la eduksistemoj kaj samtempe akuzas publike la alian pri la ne-elspezo de sufiĉa financhelpo. La rezulto estas, ke hodiaŭ la sistemoj ne bone funkcias, ĉar politikistoj ofte diras publike, ke ĝi ne bone funkcias!

Kelkaj statistikoj (1994)

	Registara	Nerigistara	Totalo
Lernejoj	7 159	2 520	9 679
Studentoj	2 214 938	884 442	3 099 380
ATSI studentoj	73 379	10 032	83 411
Fremdaj studentoj	1 197	7 555	8 752
Instruistoj	143 192	56 965	200 158
Partoprenantoj:			
16 jaraj	—	—	80%

17 jaraj	—	—	59.7%
Stud/inst proporcio:			
unuagradaj	18.3	19.1	18.5
duagradaj	12.4	12.9	12.6

Ĉar Aŭstralio estas tre granda kampara lando, estas multaj malgrandaj lernejoj, speciale en la unuagradaj* jaroj. Pro tio oni uzas multe da teknologiaj iloj por helpi la instruistojn kaj la infanojn, ekzemple, radion, televidon kaj TTT kaj ret-poŝton.

**[Ndlr - unuagradaj lernejoj en Aŭstralio: de la antaŭlerneja ĝis la 6-7-a jaro; duagradaj: de la 7-8-a ĝis la 12-a jaroj.]*

Jen kelkaj specialaj statistikoj:

- 1.8 milionoj da unuagradaj studentoj, 74.5% en registaraj lernejoj
- 1.3 milionoj da duagradaj studentoj, 67% en registaraj lernejoj
- 71% unuagradaj lernejoj, 16% duagradaj lernejoj, 9% ambaŭ, kaj 4% specialaj lernejoj
- 74.7% instruistinoj en unuagradaj lernejoj, 51% inoj en duagradaj lernejoj.

Trejnado de instruistoj

Estas du specoj - la kundaŭra kaj la sekvada. La kundaŭra speco (plen-, kaj samtempaj kursoj ĉe universitato) estas la kutima metodo por la instruistoj de la unuagradaj lernejoj, ĉar oni povas studi pli grandan amplekson da studobjektoj kun edukado, taŭga por la "unuagradaj" instruistoj. Per la kundaŭra speco oni povas gajni Dip.Teach. (Diplomo de Instruado) ene de 3 jaroj, la B.Ed. (Licencio de Edukado) en 4 jaroj; kaj pli ofta estas nun la 4-jara, duobla licencio BA/BEd kaj BSc/BEd.

La "duagradaj" instruistoj povas sekvi similajn kursojn, sed la kutima trejnado estas la sekvada speco (kiam la kursoj sekvas unu post la alia). Pli da "duagradaj" instruistoj instruas du studobjektojn en la lernejoj. Pro tiu kialo kutime ili studas por akiri licencion - ekz. B.A. aŭ B.c. en 3 jaroj, kaj poste ili studas dum unu jaro por ricevi la Diplomon de Edukado.

Nuntempaj tendencoj

De 1995 oni trovis kelkajn malbonajn tendencojn en la eduksistemo, laŭ mi la plej karakterizaj estas, ke la registaroj nun

- fermas malgrandajn lernejojn por ŝpari monon (devas esti pli ol 12 infanoj en unuagrada lernejo)
- instigas, ke la lernejestroj gajnu pli da mono per diversaj rimedoj, ekzemple de la gepatroj, de firmaoj, ktp
- serĉas studentojn en aliaj landoj, kiuj devas pagi monon por studi ĉi tie, ne nur en neregistaraj, sed ankaŭ en registaraj lernejoj
- emfazas, ke pli da gepatroj devus sendi siajn infanojn al neregistaraj lernejoj
- emfazas, ke pli da gepatroj devus elekti lernejojn por siaj infanoj, por kuraĝigi konkuradon inter lernejestroj kaj inter lernejoj

La registaroj nun preferas subteni tre modernajn teknologiajn metodojn por instrui, kaj nuntempe Aŭstralio estas la ĉefa lando por la uzado de tre moderna teknologio en lernejoj kaj universitatoj. Ekzemple estas nun 3 aŭ 4 lernejoj en Melburno kie ĉiu infano devas havi propran personan komputilon. Gepatroj aŭ aĉetas ĝin aŭ luas ĝin de la lernejo. Ĝenerale ĉiu instruisto uzas komputilon por krei instrumaterialon kaj la lernejoj plejparte uzas ret-poŝton kaj TTT eblecon.

Problemoj venontaj

La socio en Aŭstralio ŝanĝiĝas, ankaŭ la fizika kaj kultura medioj. La mondo por la studentoj estas tre moderna teknologia mondo, sed problemoj ekzistas inter homoj kaj inter rasoj kaj gentoj.

Pri la eduksistemo en Aŭstralio, laŭ mi, la ĉefaj problemoj estas

- ni havas multkulturan socion, sed nesufiĉe da homoj pensas multkulture
- Aŭstralio estas grandkampara lando, kaj oni devas kreskigi sistemon por eduki kamparajn infanojn trovi bonan vivon en la kamparo, ne en la urboj
- multaj aŭstralianoj ne scias pri la vivmaniero de siaj najbaroj en Papuo-Novgvineo, en Azio ĝenerale, aŭ eĉ de la Aborigenoj, kaj finfine
- ĉar la registaroj ne kuraĝigas ilin, la instruistoj ofte ne ŝatas siajn laboron kaj vivon, kaj tio ne kreas bonan situacion por la infanoj.

Laŭ mi, registaroj ĉi tie devas alfronti ĉi-tiujn problemojn tuj, ĉar la eduksistemo estas la plej efika metodo krei feliĉan socion. Se registaroj ne reagas rapide, la socio en Aŭstralio malpliboniĝos. Ĉiu nacio ricevas la eduksistemon kiun ĝi meritas, kaj kiun ĝi subtenas! Mi esperas, ke la eduksistemo en multkultura Aŭstralio pliboniĝos kaj suksesos, ĉar ĝi povas esti grava ekzemplo por edukado en nia multkultura mondo.

Prof. Alan Bishop, Faculty of Education, Monash University, Clayton, 3168

ILEI DUM UK

(laŭ raporto de Marija Beloševič)

Kunsido de ILEI-anoj

Ĉefa temo de la kunsido estis kontribuo de ILEI al la *Kampanjo 2000.* Surbaze de la *Eduka rezolucio,* akceptita de la Komitatkunsido dum la UK en Vieno, la ĉeestantoj de la kunsido taksis grava la trejnadon de E-instruistoj kaj E-instruantoj, sen tio kvalita instruado/lernado de E-o ne povas okazi.

ILEI planas venontjare antaŭ UK okazigi tutsemajnan seminarion. Ankaŭ dum

UK '98 ILEI organizos t.n. "Forumon" dum kiu la kongresanoj/E-instruantoj povos starigi diversajn demandojn, ligitajn al la problemoj, kiujn ili frontas dum la E-instruado. ILEI tre volonte kompilos la konsilbroŝuron kun la respondoj al la plej oftaj demandoj/problemoj de la E-instruantoj.

[La demandojn bv. sendi al la sekretario de ILEI.]

Tago de la lernejo

La nur duhoran programon reĝisoris d-ino Katalin Smidéliusz. Enkonduke estis laŭtlegita la artikolo de Duncan Charters pri multkultureco kaj lingvolernado. La ĉeestantoj aŭdis prelegon de prof. Alan Bishop pri la eduksistemo en Aŭstralio. S-ino Jennifer Bishop informis pri la rezultoj de la projekto "EKPAROLI" kaj la ĉeestaj infanoj de la projekto prezentis fragmentojn kaj dialogojn el "Gondolando". Roman Dobrzynski parolis pri la nuna stato de la Mazi-projekto. Novan vidbend-kurs-projekton *E-o, pasporto al la tuta mondo* prezentis s-ino Lucille Harmon.

ILEI-budo

Kiel kutime, ankaŭ ĉi-jare ILEI havis apartan budon. Krom la ĝeneralaj informoj pri la agado de la Ligo kaj ĝiaj eldonaĵoj kaj konkursoj, ILEI prezentis plurajn utilajn informojn kaj iniciatojn de aliaj organizoj, ligitajn al E-instruado.

Tago de la Libro

Dum la *Tago de la Libro* estis prezentita la plej nova eldono de ILEI kaj "Steleto": "Struktura kaj Socilingvistika Esploro de Esperanto".

Kolokvo

Simile al la Nitobe-simpozio, ĉi-jare UEA okazigis esperantologian kolokvon, titolitan *Propedeŭtika valoro de Esperanto.* Dum la Kolokvo estis prezentitaj kelkaj ĝisnunaj E-projektoj kaj pridiskutita estonta agado tiu kampe. Pluraj ILEI-anoj ĉeestis kaj kontribuis al la Kolokvo. *[Detalaj informoj legeblos en IPR 4/97.]*

ILEI-KONFERENCO

Konferenca temo

Al la ĉeftemo de la konferenco, *Multkultureco kaj lingvolernado,* kontribuis per prelegoj s-ro Marcel Leerreveld el Aŭstralio kaj s-ino Marija Beloševiĉ el Kroatio. La prelegojn vi trovos en la postaj n-roj de IPR.

Prelegoj kaj prezentoj de diversaj projektoj

Pluraj konferencanoj kontribuis al la konferenca programo prezentante diversajn E-instruprojektojn aŭ spertojn de la E-instruado. S-ino Jennifer Bishop prezentis la projekton *EKPAROLI.* Novan vidbendan kurson preparatan en Usono, morale subtenatan ankaŭ de ILEI, prezentis s-ino Doroteo Holland, kiu ankaŭ atentigis pri la

plej novaj eldonaĵoj de la *Infanoj ĉirkaŭ la mondo.* Pri la E-instruado en Kubo prelegis s-ro Julian Hernandez. Pri spertoj pri E-movado en Nepalo kaj loka E-instruado informis s-ro Mukunda Raj Pathik.

S-ro Steve Wagenseller (Usono) prezentis komputilan programon por plifaciligi la instruadon de E-o por bazlernejanoj. Krome, la ĉeestantoj havis la eblecon komenti preparatan korespondkurson de la Brita ILEI-sekcio (verkata ĉefe de s-ino Angela Tellier); ekkoni la informojn pri la infana retklubo, E-fako ĉe la Universitato en Poznan kaj ILEI-konkursoj.

Vesperaj programoj pleniĝis je diversaj eroj

Diversartaj spertoj de pluraj ĉeestantoj prezentiĝis dum la internacia vespero. Al la arta parto de la Konferenco kontribuis ankaŭ s-ino Jadwiga Gibczynska per la teatraĵo *Ĉu nepoj benos nin?* La ĉeestantoj spertis vidbendajn filmojn: pri Kroatio, Sud-Aŭstralio kaj Brazila E-kongreso kaj lumbildojn pri Albanio.

Ekskursoj

La konferencanoj havis du plentagajn ekskursojn: unua al Melburno kun vizito al la urbaj vidindaĵoj kaj renkontiĝo kun lokaj E-istoj (kiuj kovris la kostojn de la busluado). Dua ekskurso direktiĝis al Geelong kaj la Granda oceana ŝoseo.

Komitatkunsido

La Komitatkunsidon ĉeestis la reprezentantoj de la sekcioj el Argentino, Britio, Italio, Kroatio, Kubo, Nederlando, Svedio kaj Usono kaj la observanto de UEA, s-ino Renée Triolle. La sekciestroj el Albanio, Brazilo, Belgio, Ĉinio, Finnlando, Hungario, Japanio kaj Rusio petis senkulpigon pro neebleco reprezenti la sekcion dum la Komitatkunsido fare de iu membro.

Komence de la kunsido, la Komitato akceptis du novajn honorajn membrojn de ILEI: s-ino *Charlotte Kohrs* el Usono (iniciinto kaj la gvidanto de la projekto "Infanoj ĉirkaŭ la mondo") kaj s-inon *Idyss Einihovici* el Aŭstralio (plurjara subtenanto de E-instruado). [*La biografiojn bv. legi en IPR 4/97*].

La jarraporto (aperinta en IPR 2/97) kun la raportoj pri konkursoj (verkita de s-ro Géza Kurucz), eldona agado kaj "Juna amiko" (ambaŭ verkitaj de s-ro Stefan MacGill) akceptitaj unuanime. La komitatanoj estis informitaj pri la reviziita eldono de *Tendaraj Tagoj 2,*. kiu elĉerpiĝis. Estis akceptitaj ankaŭ la financa raporto por la jaro 1996 kaj la financa plano por 1998.

Oni substrekis la gravecon de ILEI-kasoj, kiuj diversmaniere helpas al la membroj de ne-bonhavaj landoj. La konferenca kaso ŝanĝis la nomon al "*Kaso de Catina kaj Mario Dazzini*" laŭ la propono de s-ino Carla De Lorenzi (Italio). La Komitato estis informita pri la ŝanĝoj de kelkaj sekciestroj kaj reprezentantoj [*NdlR - ĉiujn ŝanĝojn vd. sur la kovrilpaĝoj*]. La Komitato akceptis ankaŭ novan landan sekcion, nome Aŭstralion kaj bonvenigis la proponon de Bosnio kaj Hercegovino ekstarigi kontaktojn

kun ILEI pere de reprezentanto.

La Estraro informis la Komitaton pri kelkaj malbone funkciantaj estroj de sekcioj kun signifa nombro de membroj. La Estraro esperas solvi tiujn problemojn ĝis la fino de la jaro, se ne, la koncernaj sekciestroj provizore iĝos reprezentantoj, dum la Estraro informos la membrojn en la koncernaj landoj pri la situacio.

Apartan atenton la Komitato donis al la *Trijara laborplano 1998-2000* kiun oni nomis la *Strategia trijara laborplano*. Surbaze de la strategia plano la Estraro prilaboros planon kun la prioritataj punktoj por la jaro 1998 kaj kompilos la dokumenton *Kontribuo de ILEI al la Kampanjo 2000*.

La Komitato akceptis la elekto-regularon kaj elektis trikapan elekto-komisionon. Samtempe oni taskis al la statuta komisiono ĝis la 1-a de decembro liveri al la Estraro la unuan version de la nova ILEI-Statuto, kiun la Komitato findiskutos kaj espereble akceptos dum la venontjara kunsido.

Estis akceptita ankaŭ la temo de la venontjara ILEI-Konferenco: *Lingvo-instruado: ponto al la mondo*. La Konferenco okazos tuj post UK, de la 8-a ĝis la 14-a de aŭgusto, en Montpellier. Oni esperas, ke post unujara paŭzo denove okazos la gimnazio. [*La aliĝilo aperos en IPR 4/97*].

Antaŭ UK ILEI planas okazigi unusemajnan Internacian Metodikan Seminarion por E-instruantoj, kiun gvidos d-ro D. Charters.

ILEI aŭspicios ankaŭ la 10-an Alp-Adrian E-Konferencon, kiu okazos en Italio de la 9-a ĝis la 12-a de aprilo 1998 kun la temo *Instruado de Esperanto*. La proponitan kontrakton inter IEI kaj ILEI la Komitato akceptis. Oni decidis ankaŭ pri tio, ke pere de anonco en IPR, ILEI daŭre instigu siajn membrojn aboni la revuon *Eventoj*. La Komitato estis informita, ke UNESKO decidis starigi kontaktojn kun nur unu E-organizo, t.e. UEA. ILEI pretas daŭre kunlabori kaj kontribui al la rilatoj pere de UEA.

REZOLUCIO

La ĉeestantoj de la *31-a Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj*, venintaj el 15 landoj kunveninte apud *Geelong* (Aŭstralio) de la 27-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1997 kaj pritraktinte la temon *"Multkultureco kaj lingvolernado"*,

- konstatas, ke en la tuta mondo estas kreskanta multkultureco kaj samtempe rezisto kontraŭ tiu evoluo;
- atentigas la registarajn kaj edukajn instancojn, ke ili havas la respondecon eduki al socia toleremo kaj respekto en rilatoj kun aliaj kulturanoj kaj alilingvanoj en kaj ekster la propra lando;
- konsideras, ke la uzo de nediskriminacia lingvo estas logika instrumento por forigi antaŭjuĝojn pri aliaj homoj, aliaj kulturoj, aliaj lingvoj;

- rekomendas ke ili prikonsideru la instruadon de Esperanto, kiu dum tuta jarcento montris sin taŭga internacia interkomprenilo kaj diversloke utila kiel propedeŭtika enkonduko al aliaj lingvoj kaj kulturoj.

STRATEGIA TRIJARA LABORPLANO (1998-2000)

1. Sekcioj kaj membraro:
1.1. Teni intensajn kontaktojn kun la sekcioj per regulaj cirkuleroj kaj kiam eblas per vizitoj
1.2. Revigligi sekciojn neadekvate funkciantajn
1.3. Admoni sekciojn esti maksimume malfermaj al junaj praktikantaj instruistoj kaj novaj agemaj fortoj
1.4. Starigi novajn vojojn akcepti kotizojn kaj prilabori kelkajn kategoriojn de la membraro
1.5. Starigi novajn sekciojn kaj nomumi novajn reprezentantojn
1.6. Eldoni freŝan varbilon por membrigo kaj donacoj al la fondaĵoj kaj kasoj
1.7. Okazigi la konkurson *La plej aktiva landa sekcio*

2. Komisionoj kaj komisiitoj:
2.1. Malcentrigi la laboron per kreo de kerno de aktivaj internaciaj kunlaborantoj, ĉu kiel unuopuloj, ĉu kiel komisionanoj

3. Financoj:
3.1. Kreskigi la kapitalon de la Ligo per identigo de samtempe valoraj kaj enspezigaj projektoj
3.2. Alvoki por donacoj por la fondaĵoj kaj kasoj de la Ligo
3.3. Faciligi testamentadon al la Ligo
3.4. Ricevi monon de ekstermovadaj instancoj por plenumi edukajn projektojn

4. Ekzamenoj:
4.1. Reekzameni la postulojn de la elementa kaj meza ekzamenoj
4.2. Daŭre flegi la konsilarojn por la ekzamenantoj kaj kursocentroj
4.3. Daŭrigi la kiel eble plej vastan proponadon de la ekzamenoj
4.4. Praktike lanĉi la superan ekzamenon
4.5. Esplori la historion de la porinstruistaj ekzamenoj

5. Instruado kaj instru-eksperimentoj:
5.1. Kolekto de informoj pri lokaj instru-kondiĉoj
5.2. Listigo de kontrolendaĵoj
5.3. Kolokvo en Montpellier '98

5.4. Eksperimento en kelkaj lernejoj 98-99
5.5. Ekspluato de rezultoj

6. Servoj al instruistoj kaj instruantoj:
6.1. Registri kursojn ĉiunivele kaj aperigi la rezultojn en la sama lernojaro
6.2. Aperigi korespondpetojn (individuaj kaj klasaj)
6.3. Diskonigi internaciajn aranĝojn por lernantoj kaj aparte zorgi pri la Gimnazio
6.4. Daŭrigi la organizadon de internaciaj konkursoj
6.5. Peradi la kontaktojn inter samfakulaj membroj
6.6. Kompili aktualan liston de lernejoj kiuj akceptas gast-instruistojn kaj vizitantojn, kaj liston de taŭgaj vizitantoj
6.7. Helpi al malbonhavaj kolegoj

7. Instruista trejnado kaj universitata agado:
7.1. Organizi metodikajn kaj trejnseminariojn por instruistoj kun aparta atento al la regionoj (landoj) de kie oni pro diversaj malfacilajoj ne povas ĉeesti jam tradiciajn pedagogiajn aranĝojn
7.2. Diskonigi la eblecojn por internacia klerigo
7.3. Kunlabori kaj subteni E-fakojn ĉe universitatoj

8. Konferencoj:
8.1. Logi partoprenantojn el kiel eble plej diversaj mondpartoj, unuavice praktikantajn instruistojn de E-o
8.2. Fortigi la fakan programon
8.3. Faciligi interŝanĝon de spertoj pri instruado ĉiuspeca

9. Eksteraj rilatoj:
9.1. Kontakti UNESKO, UN kaj aliajn organizojn pri internacia edukado
9.2. Aktive kunlabori kun landaj kaj kontinentaj eduk-instancoj
9.3. Konstrui kaj diskonigi superrigardon pri la ĉefaj fondajoj kaj organizoj agantaj internacie pri lingvo-instruado
9.4. Reprezentiĝi en internaciaj konferencoj pri edukado kaj lingvo-instruado
9.5. Preparo por la Eŭropa jaro de la lingvo (2001)

10. Informado:
10.1. Verki nacilingvajn flugfoliojn pri ILEI
10.2. Proponi nacilingve tradukitajn aŭ verkitajn artikolojn al la faka gazetaro pri: edukado por internaciismo, la propedeŭtika valoro de E-o, la praktikaj kaj etikaj valoroj de E-o, prezento de rezultoj de E-instruado
10.3. Prilabori kaj praktike lanĉi TTT-ILEI paĝon kun plurlingvaj informoj

11. Eldonado:
11.1. Daŭrigi eldonadon de la gazetoj (IPR, Juna amiko)
11.2. Akiri taŭgajn manuskriptojn, samtempe bezonatajn kaj enspezigajn

11.3. Prioritataj kampoj estas: lernolibroj, gvidiloj, kasetoj, vidbendoj; laborlibroj; didaktikaj ludoj; pedagogiaj verkoj kaj instruistaj gvidiloj; ekzerclibroj ligitaj al la ekzamenoj; materialo pri lingvaj problemoj
11.4. Subteni alies pedagogiajn eldonaĵojn, laŭeble kuneldoni
11.5. Kunlabori en la projekto *Instruista terminaro*

12. Movada agado:
12.1. Eluzi la diskonigajn eblojn de UEA kaj aliaj, por teni movadanojn bone informitaj pri la Ligo
12.2. Fortigi la renomon de *Tago de la Lernejo* dum UK
12.3. Starigi kontaktojn kun aliaj fakorganizoj
12.4. Kunlabori kun AdeE, AIS, ELTE, Universitato en Poznan, IEI kaj similaj organizoj pri edukaj projektoj
12.5. Aktiva partopreno en la *Kampanjo 2000*

13. Bibliografio
13.1. Kunlabore kun aliaj E-organizoj kaj E-centroj komenci kompiladon de ĝenerala bibliografio de ĉiuj E-eldonaĵoj rilate al E-instruado, lernejaj eksperimentoj, k.s.

La konsisto de la Internacia Ekzamena Komisiono (IEK):

Atilio Orellana Rojas (prezidanto), Hans ten Hagen (sekretario), Bertil Andreasson (kasisto), Paul Gubbins (reprezentanto por Eŭropo), Zhang Danchen (Azio), Gbeglo Koffi (Afriko) kaj Duncan Charters (Ameriko).
Ĝis la redaktofino alvenis nur kvar aŭtobiografioj. La ceterajn ni aperigos en iuj sekvaj numeroj.



Atilio Orellana Rojas

Mi naskiĝis en 1963 en Argentino. En la Nacia Universitato de Córdoba (Argentino) mi diplomiĝis kiel magistro pri klasika filologio kaj en tiu sama institucio mi poste instruis romanistikon. En la lernejo "Alexander Pushkin", en Córdoba, post 4-jara studperiodo, mi atingis la titolon de instruisto de la rusa lingvo kaj iom tuj post tio mi ekinstruis tiun lingvon en tiu sama instituto. Mi realigis studojn ankaŭ pri filozofio kaj teologio ĉe la filio de la Gregoria Vatikana Universitato en Argentino. Pro mia forta intereso pri kompara gramatiko, mi studis diversajn aliajn lingvojn (portugalan, hebrean, germanan, f'rancan, keĉuan, svedan).

E-on mi lernis aŭtodidakte en 1984 kaj iom poste, konatiĝinte kun Cseh-metodo, sekvis la diversŝtupajn seminariojn kaj en 1990 dum la ILEI-Konferenco en

Hanabanillas (Kubo) diplomiĝis kiel Cseh-instruisto kaj en 1992 kiel gvidanto de seminarioj pri Cseh-metodo.

De kelkaj jaroj mi vizitas diversajn landojn por instrui rektmetode E-on en malsimilaj niveloj. Mi jam gvidis kursojn en 5 kontinentoj en pli ol 50 landoj. Mi realigis prelegvojaĝojn en pluraj landoj por diskonigi plurajn aspektojn de la indiĝenaj kulturoj de Ameriko, iliaj lingvoj, muziko, ktp. Mi vaste verkis kaj hispane kaj Esperante pri ĉi tiuj temoj kaj tio aperis en kelkaj E-revuoj kaj en specialigitaj revuoj en Argentino.

En la E-movado mi jam plenumis diversajn oficojn kaj daŭre estas diversgrade engaĝita. En ILEI mi membras de 1989 kaj de 1993 mi estis Reprezentanto por Ameriko en la Internacia Ekzamena Komisiono de la Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI. De 1995 mi estas estrarano de ĉi tiu organizo kaj mi respondecas pri Konferencoj kaj Ekzamenoj.

Ene de UEA mi plenumas la rolon de Komisiito pri Amerika Agado de 1994 kaj estas daŭra kontribuanto al la paĝoj de "Kontakto".

Hans ten Hagen



Miaj unuaj spertoj pri E-o estis en mia aĝo de ĉ. 6 jaroj. Miaj gepatroj estis e-istoj kaj instruis al mi kaj miaj fratoj simplajn ĉiutagajn frazetojn.

En 1947 mi aliĝis al ĉeesta kurso kaj membriĝis al la tiama Asocio de Laboristaj Esperantistoj FLE. En 1948 mi faris la (tiaman) A-ekzamenon. En tiu jaro mi partoprenis mian unuan internacian E-kongreson, la SAT-kongreson en Amsterdam.

Mi aliĝis al "Ju-Ko", la junular-komunumo de la Asocio kaj aktivis en ĝi kelkajn jarojn kiel sekretario. En 1952 mi eksiĝis el mia funkcio en "Ju-Ko" pro la civilservo, kiun mi devis plenumi pro rifuzo soldatservi. Dum tiu preskaŭ trijara deĵoro mi uzis mian liberan tempon studadi.

En 1955 mi forlasis la civilservon, trovis laboron kaj plue studadis. En 1956 mi edziĝis kaj pro familiaj kaj personaj cirkonstancoj ne plu aktivis en la E-movado. Mi daŭre korespondis, sed la nombro de korespondantoj iom post iom malgrandiĝis.

En 1982 mi denove ekkontaktis la E-movadon kaj fariĝis membro de la (tiama) Nederlanda Esperanto-Asocio kaj ĝia sekcio en Alkmaar. En 1985 mi fariĝis ties sekretario. De 1995 ĝis 1997 mi estis sekretario/kasisto. Dum pluraj jaroj mi ankaŭ redaktas la sekcian bultenon "La Fromaĝokloŝo".


En 1987 mi komencis instrui E-on kaj aliĝis al la nederlanda sekcio de ILEI. En 1991 mi fariĝis ties kasisto kaj ekde 1993 sekretario/kasisto. Kunlabore kun Internacia Esperanto-Instituto en Hago mi organizas la ĉiujaran studotagon. Ekde 1993 mi redaktas la sekcian bultenon "NGGE Sciigas".

En 1994 fondiĝis la landa asocio ESPERANTO NEDERLAND el kunfandiĝo de la antaŭaj du grandaj E-asocioj. En 1995 mi fariĝis ties kasisto. En la estraro mi estas respondeca ankaŭ pri la membro-administrado kaj pri la laboro de la estrar-komisiono pri instruado. En 1996 mi elektiĝis Komitatano-A de UEA kaj fariĝis membro de la Komisiono pri Financoj.

En 1994 mi partoprenis A-gradan Cseh-seminarion en Hago kaj poste sekvis la B-seminarion. En 1996 mi diplomiĝis kiel Cseh-instruisto.

Mi partoprenis UK-ojn en 1985, 1987, 1988, 1991, 1992, 1995, 1996 kaj 1997. En la lastaj tri jaroj mi partoprenis ankaŭ ILEI-konferencojn. Mi abonas plurajn E-revuojn kaj ĉiam esperas trovi la tempon por plenlegi ilin. Mi same ŝatas legi E-librojn, por kio ofte mankas la tempo.


Mi plej favoras la instruadon de E-o kaj bedaŭras, ke en Nederlando ne eblas enkonduki tiun instruadon en la lernejojn. La instruado okazas per kursoj, organizitaj de lokaj aŭ regionaj E-grupoj kaj per skribaj kursoj, organizitaj de la landa asocio. En la kadro de landa sekcio de ILEI ni strebas al edukado de novaj instruontoj, pliklerigo de instruantoj kaj instigo al lernantoj partopreni ekzamenojn.



Bertil Andreasson

Li naskiĝis en 1934 kaj nuntempe estas emerita instruisto de baza lernejo. Andreasson lernis E-on en kurso dum 1957-1958 kaj daŭrigis la lernadon aŭtodidakte. Li estas ILEI-estrarano de 1982 kaj plenumas ties kasistan postenon. Sekciestro de la sveda ILEI-sekcio kaj nuntempe membro de la Direkcio de la Sveda E-Instituto. Andreasson estas ankaŭ prezidanto de la suda distrikto de la Sveda E-Federacio. Membro de UEA kaj fakdelegito de tiu organizo pri instruado.

Paul Gubbins



Paul Gubbins, kat-amanto kaj fervora fervojo-amanto, ekesperantistiĝis en 1984. Eksa ĵurnalisto, li nun instruas la germanan ĉe universitato Salford (Britio). Lia Esperanto-vivo trikampe evoluis: ĵurnaliste (kunredaktoro de Monato), edukiste (aŭtoro de la OSIEK-premiita lernolibro Kunvojaĝu! kaj respondeculo pri la Esperanta somerlernejo en Barlaston, Britio) kaj dramiste (kvar fojojn premiita en la belartaj konkursoj de UEA en la branĉo 'dramo' kaj aŭtoro de la nun preparata Esperanto vidbend-filmo Pasporto al la tuta mondo). Inter pluraj vivo-bedaŭroj ĉefas tiu, ke li ne pli frue eklernis kaj ekĝuis Esperanton . . . kaj ke daŭre mankas al li tempo por ien trankvile eskapi kaj pliprofundiĝi en Esperanta literaturo.

BERNARD GOLDEN:

Instruado de bona stilo kun konsekvenca vortordo

Mankanta instruado pri stilo

Tre malofte troviĝas en kursoj kaj lernolibroj instruoj pri la evoluigo de bona stilo en Esperanto. Ofte lernantoj ricevas nur la konsilon, ke ili imitu la lingvouzon de la t.n. bonaj aŭtoroj. Tamen, ne estas eble objektive ekscii, kiuj estas tiuj bonaj aŭtoroj, kaj surbaze de kiuj kriterioj ili estas "bonaj". Efektive, multaj konataj verkantoj pekas pri stilaj misaĵoj simple pro influo de sia gepatra lingvo aŭ pro miskompreno pri la grado de libereco permesebla en la kunmetado de partoj de frazoj. Valoras ĉi-kuntekste citi la opinion de Kolomano Kalocsay, publikigitan en 1931 en *Lingvo Stilo Formo* (pĝ. 79-81).

En Esperanto la vortsekvo estas libera. Sed tio ne signifas, ke oni povas laŭplaĉe disĵeti la frazerojn kaj tamen havi bonan, agrablan stilon. Kelkajn reguletojn bone estas memorteni.

1. Subjekto kaj predikato estu proksime unu al la alia. Ilin apartigu maksimume adverbo. Kompreneble, la subjekto-predikatan komplekson, kiel tuton, oni povas laŭplaĉe ŝovi tien-reen en la frazo. Sed la apudeco estas grava apartenaĵo de la bona proza stilo, precipe, se la subjekto estas persona pronomo. ...
2. Se participa adjektivo havas objekton, kaj ankaŭ ĉi tiu objekto havas epiteton, multaj verkantoj embarasiĝas pri tio, kiel ordigi plej bone la vortojn. Ekzistas tri eblaĵoj:
   a. "*la grandan penon postulanta laboro*"
      Ĝi estas la malplej bona, ĉar la artikolo staras antaŭ la adjektivo *grandan*, kvankam ĝi rilatas al la substantivo *laboro*.
   b. "*la postulanta grandan penon laboro*"
      Ĉi tiu varianto, kiun ŝatas precipe rusoj, estas iom pli bona, sed tamen fremda por multaj pro la apartigo de la adjektivo kaj substantivo.
   c. "*la laboro postulanta grandan penon*"
      Jen la plej perfekta kaj sekvinda eblaĵo; **en ĝi ĉiu frazero staras senpere apud la frazero, al kiu ĝi rilatas.**

   Se la particip-objekto ne havas epiteton, plej elegante estas kunfandi ĝin kun la verb-radiko de la participo en kunmetitan vorton. Anstataŭ: "*pacon donanta morto*" ni diru: "*paco-dona morto*", anstataŭ "*ĉion vidanta suno*": "*ĉiovida suno*".

En tiu ĉi artikolo mi deziras montri, kiel instruantoj de Esperanto povas atentigi siajn lernantojn pri malbonaj stilaj trajtoj en tekstoj, kiuj trafas en iliajn manojn.

La elementa nivelo de lernado

Estas necese, ke komencantoj ricevu instrumaterialon verkitan en neriproĉebla stilo. Bedaŭrinde, ne ĉiuj aŭtoroj de lernolibroj estas kompetentaj pri ĉi tiu aspekto de lingvouzo. Respondeca instruanto havas la taskon trakibri la enhavon de lerniloj por elimini aŭ reverki frazojn, kiuj povas kaŭzi konfuzon aŭ miskomprenon. Jen tri ekzemploj ĉerpitaj el la rektmetoda kurso *En novan mondon* verkita de Vilma Sindona Eichholz.

1. "*Vi sentis ŝian embarason kaj invitis ŝin ludi kun vi, por ke ŝi sentu sin pli bona kaj almenaŭ de unu el ni akceptita*" (pĝ. 169).
2. "*Esperanto estas ankaŭ pli preciza dank' al la akuzativo, ol lingvoj kiuj ne havas ĝin*" (pĝ. 233).
3. "*Tamen je militfino Moses Kaver eksciis, ke ĉiuj liaj iamaj sklavoj malaperis, escepte de pro koklušo severe malsana knabo*" (pĝ. 181).

Por ke la frazoj estu pli facile legeblaj kaj kompreneblaj, oni devas apliki la regulon de Kalocsay kaj skribi apude la frazerojn, kiuj interrilatas gramatike kaj semantike.

1. ... *por ke ŝi sentu sin pli bona kaj akceptita almenaŭ de unu el ni.*
2. *Dank' al la akuzativo, Esperanto estas ankaŭ pli preciza ol lingvoj kiuj ne havas ĝin.*
3. ... *ĉiuj liaj iamaj sklavoj malaperis, escepte de knabo severe malsana pro koklušo.*

Meza nivelo de lingvo-alproprigo

Post kiam lernantoj akiras kapablon facile legi literaturajn tekstojn, ili povas ricevi kiel ekzercon reverkadon de mise kunmetitaj frazoj. Repensado de la esprimmanieroj en tiu ekzerc-materialo donos al ili eblon diferencigi diversajn stilajn rimedojn kaj elekti la plej trafajn.

La sekva mise konstruita frazo troviĝas en la rusa porinfana romaneto *Timur kaj lia taĉmento* de A. Gajdar, esperantigita de E. S. Perevertajlo (1982).

"*Potencaj, jungitaj per rimenoj kaj ferаĵoj ĉevaloj rapide tiris post si verdajn obusajn kestojn kaj per griza ŝtofo kovritajn kanonojn*" (pĝ. 22).

Por analizi tiun frazon, estas necese serĉi la sintagmojn (grupojn da vortoj havantajn gramatikan kaj semantikan kunligon) kaj rearanĝi ilin en konsekvenca ordo en la frazo, por ke ili staru apude. Interrompas la sintagmon "*Potencaj ... ĉevaloj*" kvinvorta enkadrita sintagmo: "*jungitaj per rimenoj kaj ferаĵoj*". Inter la du objektojn de la verbo "*tiris*" ("*kestojn*" kaj "*kanonojn*") estas enŝovita la sintagmo "*per griza ŝtofo kovritajn*". La plej efika maniero scii, pri kio temas, estas fari demandojn kaj doni respondojn.

a. Pri kio temas? "*potencaj ĉevaloj*"
b. Kiel estis la ĉevaloj? "*jungitaj per rimenoj kaj ferаĵoj*"

c. Kion faris la ĉevaloj? "*rapide tiris post si*"
ĉ. Kion ili tiris? "*obusajn kestojn kaj kanonojn*"
d. Kiaj estis la kestoj kaj kanonoj? "*verdaj kestoj*" kaj "*kanonoj kovritaj per griza ŝtofo*"
Post reverkado la ĝustigita frazo tekstas jene: *Potencaj ĉevaloj, jungitaj per rimenoj kaj ferajoj, rapide tiris post si verdajn obusajn kestojn, kaj kanonojn kovritajn per griza ŝtofo.* En la parola lingvo mallonga paŭzo post "*kestojn*" funkcias same kiel la komo por indiki, ke la sintagmo "*kovritajn per griza ŝtofo*" rilatas nur al la kanonoj. Estas necese emfazi, ke la originala frazo apartenas al la kabineta, skriba stilo kaj neniel spegulas la vivantan, parolatan lingvon.

Malbona stilo estigas gramatikajn erarojn

Lernantoj, analizante tiajn frazojn, povas malkovri, ke unu el iliaj insidaj trajtoj estas la tendenco okazigi gramatikajn erarojn.
Ilustras tion la sekva frazo.

"*... kaj oni povas ŝanĝi de unu litertiparo aŭ lingvo al alia per en la tekston metitan komandon*" (Rüdiger Eichholz, *Terminologia Vortaro*, 1986, 4-a aldona paĝo).

Kion volas diri la aŭtoro? Oni povas printi literojn per malmultekostaj printatoroj kaj ŝanĝi de unu litertiparo aŭ lingvo al alia per komando metita en la tekston. En la sintagmo "*per komando metita en la tekston*" estas evidente, ke "*komando*" kaj "*metita*" sekvantaj la prepozicion "*per*" devas esti en la nominativa kazo. Sed, ĉar la verkinto apartigis tiujn vortojn disde "*per*", li akuzativigis ilin pro influo de la vorto "*tekston*".

Ne estas eble preteksti, ke la superflua akuzativigo en la citita frazo estas la rezulto de komposteraro. La samspeca eraro estas trovebla en alia frazo de tiu denaska parolanto de la germana lingvo, kiu havas la malbonan kutimon pensi germane kaj skribi Esperante.

Testu vian kapablon trovi la eraron en jena frazo.

"*Komence de ĉiu nova jaro mi intencas aŭtomate prepari indeksojn pri ĉiuj en la antaŭaj jaroj enigitaj kaj korektitaj terminojn...*" (Rüdiger Eichholz, *Terminologia Vortaro*, 1986, pĝ. 41).

Ankoraŭfoje du sintagmoj, "*en la antaŭaj jaroj*" kaj "*enigitaj kaj korektitaj*" interrompas la pensfadenon de la verkinto, do li misakordigis "*pri ĉiuj*" kaj "*terminojn*", erare pensante, ke "*terminojn*" estas la objekto de "*enigita kaj korektitaj*". Li simple preteratentis la sintagmon "*pri ĉiuj terminoj*", en kiu la substantivo devas esti en la nominativa kazo.

Kursoj por perfektiĝantoj, instruontoj kaj metodikistoj

Ekzerc-materialo utila por tiu ĉi stadio de lingvolernado konsistas el frazoj kun multe pli komplikaj konstruoj. Ili estas veraj vort-labirintoj kaj postulas du- trifojan

legadon por akiri plenan komprenon de la enhavo. Mi proponas, ke instruantoj prezentu la sekvajn tri tekstojn kiel ekzercon por siaj lernantoj. La plej trafaj reverkitaj versioj estu sendataj al la redakcio de IPR por publikigo en sekva numero de la revuo.

1. "... mi kun danko akceptas proponon de la organo esperantista doni sur ĝiaj paĝoj mallongan karakterizon de l'afero, al kiu mi tutplene fordonis miajn fortojn. Povas esti, inter la simpatiaj por mi utopiistoj de l'unika disŝiranta naciajn kadrojn tutmonda lingvo revokigos la pli preparita de la historia evoluado ideo de l'unika disŝiranta kadrojn de la specialaj scioj tutmonda scienco" (Aleksandro Bogdanov, *Sennacieca Revuo*, februaro 1924, pĝ. 83-84, tradukita de N. Nekrasov el la ruslingva manuskripto).
2. "La vizion de Zamenhof pri estonta homa socio deklarita en 1907 en la Guildhall de Londono Murgin pritraktas kiel de aliaj Zamenhof-historiografoj ne sufiĉe atentita socia platformo de Zamenhof post Hilelismo (1901) kaj Homaranismo (1906)" (Fritz Wollenberg, *Bulgara Esperantisto*, februaro 1990, pĝ. 11).
   Rimarko: En tiu frazo mankas akuzativaj akordoj!
3. "Plej bone rimarkis Lia Eminenca Moŝto, la kardinala protektoro, ke senĉesa serio de 25 kongresoj antaŭiris la hodiaŭan, kiu nun, post longa interrompo, kaŭzita per la malĝojiga milito kun ĝiaj grandegaj revolucioj, ĉi tiu teruregа al la tuta homaro sendita skurĝo de sango kaj fajro, kiel la 26-a kongreso malfermas novan serion" (*Katolika Mondo*, numero 2, 1922/23, pĝ. 1).

Bernard Golden, Damjanich u. 1/C. I. 8. HU-8200 Veszprém, Hungario

---


↓ *NdlR - En la lastaj du jaroj en IPR aperis pluraj reformemaj, lingvistikaj artikoloj. Laŭ la granda procento de tiaj materialoj inter la alvenintaj artikoloj, novaj kontribuoj, reagoj ni vidas, ke ili interesas la publikon. Samtempe ni konscias pri tio, ke IPR estas ne lingvistika, sed pedagogia revuo.*
Nia redakcio tamen ĝoje ricevis la suban artikolon de Blazio Vaha, filologa kandidato kaj konata lingvisto, kie li profunde kaj science analizas kelkajn pli fruajn artikolojn, diskutojn. Per tiu ĉi resuma artikolo ni fermas la temon por doni pli da spaco al temoj pli strikte pedagogiaj.

BLAZIO VAHA: Simplaj komplikaĵoj

1. Igis niajn cerbojn funkcii kaj emigis nin pli aŭ malpli diskuti antaŭ du jaroj rekomendoj de Bernard Golden[1] kaj Johano Petik[2], ambaŭ dankindaj pro aktiva intelekta laboro. Iliaj artikoloj kaj la reagoj je tiuj artikoloj estas aperintaj tra pluraj numeroj de Internacia Pedagogia Revuo – en la revuo, kies titolon – laŭ pli ĝenerala rekomendo de Akiko Nagata – mi mallongigados je substantiveca[3/a], akcentebla, deklinaciebla kaj plurvokala formo: I*Ped*Ro.

Influita de Johano Petik, de Mike Sadler kaj de mia propra provemo kelkloke mi

indikos novan informon en la propozicio per superstrekéto (=akcentosigno), kiu do indikos né vokal-kvalíton, nék nuran akcénton de vórto, sed parton de la frazokoménto. Cetere – kiel tion tuŝas ankaŭ Johano Petik – eblas havi únu aŭ plúrajn akcentojn.



Grafika indikado de la frazofokuso eblas ankaŭ per krajóno aŭ specialaj litertípoj, sen laciga substrekádo, se oni skribas aŭ tajpas; kaj sen trouzádo de la plurfunkciaj presrimedoj, se oni printas aŭ presas[3/b].

2. Komplika transitiveco en Esperanto kaj simpligita transitiveco en IDO – estis la titolo de artikolo de Bernard Golden[1] en la unuaj du numeroj de IPedRo en 1995.

Laŭ la zorge verkita, bone strukturita artikolo de Bernard Golden oni povas konsciigi al si, ke la *esperantista komunumo kiel tuto ĝis nun né sukcésis stabile alproprigi distingadon de transitivaj kaj netransitivaj verboj.*

En siaj konkludaj alineoj Golden[1] interalie skribas: "... se oni adoptos liberalan sintenon pri gramatikaj demandoj, tiam estos eble simpligi la traktadon de transitiveco en Esperanto kaj akcepti la demotikan lingvaĵon, kiu jam nuntempe estas la interkomunikilo de granda parto de la Esperanta lingvokomunumo."

Bernard Golden, kiu pli frue kutime célis laŭnorme kaj laŭdokumente pliboníge la lingvouzon de simpluloj kaj renomuloj, nun ekpreféris modifi la direkton de la lingvo-evoluo kaj de lingvo-influado institucia: anstataŭ senespere korektadi, oni prefere akcéptu la modifojn desúbajn, spontanéajn.

La malstabileco en la rilato de la esperantistaro al transitiveco, krom al la diversaj fonaj lingvoj, rilatas al pli-kaj-plia aplikiĝo de (iel ajn komprenata) sufiĉo kaj necéso, al la malstabiléco (eĉ: pli-kaj-plia malstabiliĝo) de la radikkaraktéroj aŭ kategoriaj radikpreféroj. Kiam urĝanta jam aperas nur kiel urĝa, kiam – je senco vundanta kaj vundita – multaj el ni uzas nur formojn kiel vunda (loko, punkto, tranĉilo, hundo), kiam fiksa[4] estas ekvivalenta (resume) je fiksita, fiksanta, fiksad(o)a ktp., kiam oni pli kaj pli ĝeneralígas verbígon[5] (novi, nigri, leoni, fundamenti (?), destini (?) (laste: 'esti la fundamento, esti ies destino'; ĝenerale: esti -o): tiam malklariĝo de deriv-historio de vortoj estas népra; kaj iĝas nepra ankaŭ "diskompréno" kaj laŭsenca "disstabilíĝo", diversmaniera leksikiĝo de vortoj derivitaj.

Mi ne estis, ne iĝis kaj ne estas konvinkita pri oportuneco de principa kaj kompleta allaso de paralelaj formoj kiel ligno brulas kaj li brulas lignon, akvo bolas kaj mi bolas akvon kun t.n. ambaŭtransitivaj verboj. Kompreneble oni bezónus detále argumenti pri ia ajn starpunkto, konsiderante ĉiujn eblajn senperajn kaj peratajn sekvojn tra la lingvosistemo: tion faris parte alíaj, kaj mi faros ion tian sur paĝoj de Literatura Foiro. – *Ambaŭtransitiveco* de tiu aŭ alia difinita aŭ eventuale eĉ: nur da

[Daŭrigo sur la 21-a paĝo]

Se vi...

☑ finis kurson kaj deziras levi vian lingvo-scion...
ek-abonu la revueton:
☑ instruas Esperanton aŭ gvidas kurson...
el-uzu la revueton:
☑ ŝatas surprizi geknabojn...
donacu la revueton:
☑ volas ligi novulojn al la movado...
legigu la revueton:
☑ ampleksigas vian bibliotekan kolekton...
abonu la revueton:
☑ sopiras je variaj legaĵoj interesaj...
legu la revueton:

E Juna amiko



ilei

internacia ligo de esperantistaj instruistoj

Internacia Esperanto-revuo de ILEI por lernejanoj kaj komencantoj kun internacia redaktistaro, grafikistaro kaj legantaro en 82 landoj

dum 25 jaroj en la servo de nia nova generacio

Kvizo kun premio pri nia juna amiko:

Legu la suban tekston kaj respondu la kvizon en la hejmpaĝo de JA!

Juna amiko aperas 4-foje jare sur 24-paĝoj, ofte kun aldona koloro. Kunlaborantoj en 14 landoj inkluzivas tri grafikistojn. La eldonkvanto altiĝis ene de unu jaro de 2000 ĝis 2500 kaj plie ĝis 3000. Tio okazis pro kuraĝa decido de Brazila Esperanto-Ligo mendi kolektivan abonon de 800 ekz.; ĝi dissendas ilin kun la propra gazeto al ĉiu sia membro.

La legantaro formas tutmondan familion en ĉiu kontinento. Tio eblas ĉar ILEI fiksas abon-tarifojn proporcie al viv-niveloj. Krome, ĝi donas grandajn rabatojn por kvantaj mendoj (ĝis 50%), por kuraĝigi al lernejaj klasoj mendi ekzempleron por ĉiu studanto. Trie, ĝi dissendas plurajn centojn da ekzempleroj, ĉu proprakoste, ĉu laŭ specialaj favoraj kondiĉoj por ke ĝi atingu ĉiun mondparton. Tiel pli ol 200 ekz. distribuiĝas tra Afriko, 99 ekz. eniras Ĉinion, pluraj dekoj disvastiĝas tra suda Azio kaj Latinameriko.

Landoj kun pli ol 50 abonantoj estas Francio, Hungario, Kroatio, Italio kaj Usono. Jen familio al kiu indas aparteni!

Reklam-tarifoj

Kvarona paĝo: **57 NLG aŭ tri okcidentaj jar-abonoj, laŭ via loĝ-lando. Por reform-eŭropo: 999 HUF.**

Duona paĝo: **95 NLG aŭ 5 jar-abonoj. 1900 HUF.**

Tuta paĝo: **133 NLG aŭ 7 jar-abonoj. 3700 HUF.**

En la dissendo de la revuo al eŭropaj adresoj, restas ĉ. 50 gramoj da libera pezo. ILEI volonte disponigos tion al asocioj aŭ al iuj dezirantaj distribui flugfoliojn aŭ simile. Bonvolu peti kondiĉojn kaj informojn de la administranto.

Redaktoro: Géza Kurucz, Hitel u. 10, fszt. 16, HU-6000 Kecskemet, Hungario.
Rete: bjg@mail.datanet.hu
Hejmpaĝo: http://w3.datanet.hu/~bjg.esperanto (konkursoj, peranto-listo, nia kvizo k.m.a.)
Administranto, ekspedo: Stefan MacGill, pf. 193, HU-1368 Budapest, Hungario.

La abonservo de UEA en Roterdamo akceptas plen-prezajn abonojn je 19 NLG. Se vi enpagas monon sur nian konton ĉe UEA, nepre informu nian administranton pri tio! La kasisto de ILEI en Svedio akceptas abonojn en konvertebla valuto, laŭ via enlanda tarifo.

Prefere, abonu tra via landa peranto, La nomo kaj adreso de kelkaj legeblas apude. Petu pri aliaj. Aperas tri prezoj, ĉiu por unu kalendar-jara abono:


Prezo 1: **1** aŭ **2** abonoj
Prezo 2: **3** ĝis **6** abonoj
Prezo 3: **7** abonoj aŭ pli.

Pli ol 15 abonoj? Petu eĉ pli favoran prezon!

Francio: UFE, 4 bis, rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. FRF 55; 45; 30.
Hungario: Molnár Mónika, Ságvári u. 21, HU-9735 Csepreg. HUF 400; 320; 250.
Italio: Carla de Lorenzi, Via Boston 65, IT-10137 Torino (konto 33868100). ITL 18000; 14000; 10000.
Nederlando: H. ten Hagen, Middenweg 587, NL-1704 BH Heerhugowaard. Pĝk: 6808931. NLG 19; 15; 10.
Svedio: L. Andreasson, Södra Rörum, pl. 455, SE-242 94 Hörby. Pĝk. 147429-5. SEK 85; 65; 45.
Usono: ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. USD 12; 9; 6. Aere.

Tendaraj tagoj

la dua kajero reviziita, relanĉota favor-preze!



La dumil ekzemplera unua eldono de ĉi tiu situaci-komunika lernolibro por junuloj jus elĉerpiĝis. Sed la tendaranoj, la urso, la spiono 005, la estro Z, la kamelo, la volapukistoj, la Fantoma Stampisto ne malaperos! La reverkita, rearanĝita versio ampleksos 20 pliajn paĝojn. Ĝi ja prezentos esence la saman materialon en la sama vicordo, sed videblos la sekvaj novaj trajtoj:

- Pli granda litertipo, pli bone spacita, kun ilustraĵoj kiel antaŭe de Pavel Rak.
- Novaj partoj (kun novaj bildoj) elstarigante pli klare la ĉef-celon de la paĝo.
- Emfazo pli forta sur la verboj kaj iliaj kuntekstoj kaj ĝusta uzado.
- Pli da ekzercoj, rol-ludoj kaj aliaj labor-librecaj elementoj.

ILEI anoncas specialan relanĉan prezon por la dua kajero, valida ĝis la 30a de novembro por fruaj mendantoj. Nome, la ekstraj 20 paĝoj kostos al vi neniom pli. Plie, la trian kajeron ni dumtempe rabatigas, ofertante ĝin sampreze kiel la duan. Mendoj por TT1 kaj TT3 estos tuj plenumitaj, tiuj por TT2 tuj post ĝia apero el presejo. Mendoj por la instruista gvidilo same. Kaptu la okazon! Uzu la mendilon dors-flanke, nur ĉe la donita adreso validas la rabatoj.

Priskribo de pliaj eldonaĵoj aperas sur la sekva paĝo.
Niaj prezoj inkluzivas surfacajn sendokostojn.

Titolo	Unu ekz.	Ekde 3 ekz. po	Ekde 9 ekz., po
SSEE Koutny, Kovács	15 NLG	10 NLG	8 NLG
Kantlibro Rømmesmo *	8 NLG	6 NLG	4 NLG
Tendaraj tagoj I	12 NLG	8 NLG	6 NLG
Tendaraj tagoj II * **	15 NLG	11 NLG	8 NLG
Tendaraj tagoj III *	15 NLG	11 NLG	8 NLG
Instruista gvidilo (kajero II)**	8 NLG	6 NLG	6 NLG
Tendaraj tagoj I+II+III * **	34 NLG	26 NLG	21 NLG
Valeurs socio...Symoens A/F	6 NLG	4 NLG	3 NLG
Lingvo-instruado Szanser	24 NLG	18 NLG	15 NLG

* *Malaltigitaj prezoj! Validaj ĝis 30a nov. 1997.* ** Antaŭmende.

ALIAJ ELDONAĴOJ DE ILEI

Struktura kaj Socilingvistika Esploro de Esperanto. Budapeŝto: Steleto kaj ILEI, 1997. Redaktis Ilona Koutny kaj Márta Kovács. 165p. 21 cm. Memor-libro honore al prof. István Szerdahelyi. Dudeko da fakaj elkonferencaj artikoloj de renomaj aŭtoroj, i.a. Traunmüller, Vaha, Piron, Ŝevĉenko, Blanke, Ertl, Katsumori, Yi Qiao kaj Szerdahelyi mem.

Fantaziaĵoj kaj kantoj por infanoj, JON RØMMESMO: Libro de 56 kantoj kaj 17 rimaĵoj por junaj infanoj (unuavice 4-10-jaraj), ilustrita de la aŭtoro, kun muziknotoj. 100p. A4-formato. Vidu paĝon 6 de JA 95/3.

Valeurs socio-politique, pédagogique et culturelle de l'espéranto. ILEI. E. Symoens. 44p. Franc-lingva informilo pri la edukaj, sociaj kaj kulturaj valoroj de Esperanto. Angla-lingva versio aperis sub la titolo "The Socio-Political Educational and Cultural Roots of Esperanto". Aperis en Esperanto ĉe UEA en la serio *Esperanto-dokumentoj*.

MENDILO

Bonvolu sendi al ILEI, pf. 193, HU-1368 Budapest, Hungario

- ☐ Mi estas ne-abonanto de *Juna amiko* . Bonvolu sendi al mi specimenon.
- ☐ Bonvolu sendi al mi specimenon de *Internacia Pedagogia Revuo*, kaj informojn pri aliĝo al la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).
- ☐ Bv. sendi al mi liston de nuntempe livereblaj libroj ne eldonitaj de ILEI mem.
- ☐ Bv. sendi al mi respondilon per kiu mi donu informojn pri Esperanto-klaso.
- ☐ Bv. sendi ____ ekz. de ĉi tiu mendilo. (*Ĉiukaze, mi laŭeble aldonas 2 irpk)*

Mi mendas:

_____ ekz. *SSEE*:	NLG	_____
_____ ekz. *Fantaziaĵoj kaj Kantoj por Infanoj.*		_____
_____ ekz. *Tendaraj tagoj, kajero I*		_____
_____ ekz. *Tendaraj tagoj, kajero II* **		_____
_____ ekz. *Tendaraj tagoj, kajero III*		_____
_____ ekz. *Tendaraj tagoj, tri-kajera kompleto* **		_____
_____ ekz. *Tendaraj tagoj, instruista gvidilo por kajero II* **		_____
_____ ekz. *Teorio kaj praktiko de lingvo-instruado (Szanser)*		_____
_____ ekz. *Valeurs socio-politique, ...(Symoens)*		_____
_____ ekz. *The socio-Political, Educational...(Symoens)*		_____
	SUME:	_____

Ni fakturos la librojn en guldenoj, krom se vi petos alie. Pagojn vi povos fari al nia konto *ilek-a* ĉe UEA, aŭ al nia kasisto en Svedio. La fakturo liveros plenajn pag-informojn; ni petas pagon ene de 30 tagoj. ** antaŭmende! julio 97

Nomo: _____ **Subskribo:**_____ **Dato:**_____

Adreso kien sendi la librojn: _____

_____

kreota verbo efektive estas ébla; sed, ne estas inde kaj senprobleme igi en Esperanto ambaŭtransitivecon *princípa*, sistéma, ĝenerála. Tia procedo estas, laŭ mi, malrekomendínda, minimume pro la protektenda kontinueco de la lingvo – laŭ ideoj ekzemple de Ludoviko Lazaro Zamenhof[6] kaj Francisko Simonnet[7]. Mi asertas ĉi tion malgraŭ tío, ke Bernard Golden rájte kaj práve referencas al cedemo de L. L. Zamenhof, kiu ne konsideris ekskludinda eĉ ŝanĝiĝon de la lingvo ĝis nerekonebleco. Ŝajne L. L. Zamenhof iel sukcesis en si kunígi konservémon kaj ŝanĝémon aŭ minimume tolerémon je ŝanĝemo.

En la diskuto ĉe IPedRo estas laŭ mi prava prefere Mike Sadler[8], kiu – helpe de kelkaj ekzemploj – montras aŭ konjektigas, ke se oni konsideras ankaŭ la eblajn derivajojn de la verboj, ambaŭtransitiveco nova (kunekzistunta, sendepende de ies ajn intenco, kun la malnovaj opozicioj laŭ transitiveco) póvus káŭzi parte miskomprénojn, parte streĉoséntojn.

Oni estus maltrankvíla pro la nepra hezitado kaj ĉe parólo, kaj ĉe aŭskulta penado kompréni. Rememoru, sen ĝen(*iĝ*)i, kelkajn el la ekzemploj de Mike Sadler: Maria ĝenas min, kaj: Mi ĝenas, kaj: Ĉu vi opinias, ke mi ĝenas?[3/b]

Bernard Golden kompreneble estas práva pri ekzisto de demotika (neprestiĝa, subnorma, pleba) lingvovarianto aŭ tiaj lingvovariantoj. Liajn tiutemajn asertojn subtenas né nur spértoj de ĉiu ĝisbakita esperantisto, sed ekzemple ankaŭ analízoj de Francois Lo Jacomo[9]. Tamen estas inde (plu kaj insiste) distingadi lingvovarianton demotíkan, subnórman unuflanke, kiu prefere restu tía (donante eblojn ekzemple por stilbezonoj de literaturo), kaj la lingvovarianton nórman aŭ norminténcan, aliflanke: disde kiu eblu deviadi, kiam oni stile deviemas aŭ kiam oni ne kapablas ne devii.

Bernard Golden estas práva (laŭ mi) ankaŭ pri la punkto, ke alproprigon de transitivaj kaj netransitivaj verboj plifaciligas sistemo, en kiu la koncernaj verboj *né éstas samradíkaj*: li citas ekzemplojn de tio el la lingvoj Ido kaj Occidental. En tiurilate "Okcidentaleca" Esperanto, laŭ mia kompreno, oni 1) ion (kvazaŭ) *termínus* aŭ finus; kaj kion oni terminus, 2) tio siaparte *cessus*: do ne kunekzistus aŭ ne kun-uzatus vortoj kiel fini kaj finiĝi. Tiuj ideo kaj modelo estus bónaj (kun alia radiko anstataŭ cess, en E-o paronimia), sed nur se oni ne aplikus ilin al elementoj (vortoj) jam tradicíaj: vortojn laŭ la rekomendata valenta strukturo oni havu (se oni volas, se oni bezonas) aldóne, sén ŝánĝi tion, kio jam ekzistas laŭ difinita uzmaniero. Ekuzo de vortoj novaj kun malpli strikta valentaro estas (estus) maniero "ŝánĝi sen ŝánĝi": maniero modifi la sistemon maldráste.

Tian delikatan (kaj cetere eksterplanan) manieron prezentas (per si) ankaŭ nún, spontanea kaj nerezistata apéro de vortoj kiel eki, starti. Paralele kun la malnovaj frazoj Ni (=homoj, agantoj) tuj komencos (la prezentadon)" kaj Ĝi (=la prezentado, ago) tuj komenciĝos; oni jam nún uzas "samvérbajn" frazojn kiel Ni tuj ekos kaj La prezentado tuj ekos.

Pláĉis al mi alparolo de Bertil Nilsson[10]; li ja né rekoméndas ŝanĝi la lingvon,

tamen atentigas pri la ebloj de sentrúda modifádo iom-post-ioma laŭ Zamenhofa modelo; li atentigas ankaŭ pri la nediskutébla rájto de iu ajn kréi alían lingvoprojekton, se iu émas tion fari. Li esprimas ankaŭ, ke reformideoj devas esti (kiel ĉio ne vivodanĝera aŭ vivonoca) tolerátaj kaj rajtas esti konsiderátaj, analizátaj, eĉ se ili ŝajnas aŭ estas (ja rajtas esti) rifuzótaj.

3. Ankaŭ la ideoj de Johano Petik[2] (pri bezonata atento al emfazo en frazo) né éstas mokíndaj: ili indikas seriozan analizémon kaj ankaŭ analizon jam farítan, kiujn ja oni devas aprézi eĉ se oni malakcéptas aŭ né túte akceptas ĉiujn liajn konkludojn kaj lian reformemeton. Johano Petik, aliflanke, devas tróvi maniéron, témpon, rítmon de prezentado, kiuj ebligas al la komunumo konsciigi kaj digesti la eséncon, la elementojn pli aŭ malpli gravajn, sendubajn aŭ diskutindajn; krome la motivojn bázajn en liaj rekomendoj. Mi scias, ke li havis rekomendojn pli diverĝajn disde la Esperanta parolkutimo, kaj kompromíse li venis al la nuna, laŭ mi pli pripensita varianto: tiela irado ŝajnas daŭrigínda. Rekomendojn (la pli fruajn kaj ankaŭ ĉi tiujn) né éblas iel ajn al iu ajn trúdi, sed ili kutime estas, kaj ankaŭ ĉifoje estis, prezentindaj.

Johano Petik, prave, atentígas, ke en la – parole aŭ skribe praktikata – ĉiutaga E-o regas emfazo-manieroj ĝéne divérsaj; ke ĉe traduko ofte multe da informoj kaj eĉ la ideo pri la esenca celo de la eldiro pro tio perdíĝas.

Li asertas práve, ke en multaj modelaj tekstoj (ankaŭ, cetere, en Zamenhofaj), la fokusa loko de la frazo tendence estas ĉe la frazofino aŭ en frazofina blóko. Rememoru la frazojn de la Iniciatinto dum la Bulonja Kongreso: "... Ili renkontas sin reciproke *ne mute kaj surde*... Tie la reciproka kompreniĝado estas atingebla *per vojo nenatura*..., hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Maro *kunvenis ne Francoj kun Angloj, ne Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj*. Estas vero, ke multaj el ni posedas nian lingvon ankoraŭ *tre malbone*,... mi estas *nur homo*. (L. L. Zamenhof: Parolado dum la I-a Universala Kongreso de Esperanto).

Johano Petik samtempe eráras opiniante, ke per kunvenigo de ia pli-malpli loka decidemularo aŭ per konvinkado de elektataj de li personoj oni povas unupaŝe véni al pli gránda konkórdo en nia lingva praktiko; ŝajnas al mi, ke li táksas tró ankaŭ la eblon de subita ŝanĝo en lingvouzo de tuta komunumo. Laŭ mi li ja hávas iom da eblo influi la lingvopraktikon (kiel ankaŭ Ido influis E-on postlonge), sed né en la rékta, túja maniero de li preferuta. Li devus konsideri ankaŭ, ke koncerne aktualan dividon[11/a] de la frazo (kaj do: koncerne emfazadon, reliefumon) havas rolon – krom vortordo – ankaŭ tonfortéco kaj tonaltéco: frazakcénto. Tial nek estas la Hungara[11/b] lingvo la lingvo sóla, kiu distíngas, laŭ informo-valoro, frazelementojn[12], nek estas en E-o ĉio perdita pro la efektiva ĥaoseteco de la vortordo praktikata nuntempe. Ĉiuokaze, estas véro, ke frazakcento perceptebla orele, en skribo restas senindíka. – Oni ja póvus ĝin indiki, oni ĝin indiki póvus: en la jusaj propozicioj mi ilin indikis per superstrekéto. Tian indikon mi trovas uzinda fakultatíve; ankaŭ por influi, pere, malrekte, la rimarkémon je vortórdo[13]

4. *Eksterkadre*. – Estas edífe pripénsi la situacíon de la aŭtoroj en la Esperantista socio. Johano Petik akravide analízas frázojn de la lingvo Hungara kaj de Esperanto; li estas esperantisto relative izolíta, kiun eble ankaŭ pro tio málpli ol aliajn ĝenas la sento, ke praktike uzata lingvo né povas ŝanĝiĝi subíte, káj pro natura socia inertéco, káj pro multfaktoréco de ĉia lingvoevoluo.

Kíel efíkos al Johano Petik, al la "nelge"[14] entuziasma esperantisto, la pli aŭ malpli fortaj kritikoj kiujn li renkontis, se lia fono estas pli lingva ol homa, societa? Mi né scías.

Mi pensas, ke lia decidemo influos nin aliajn pozitíve; estus bone, se ankaŭ lí ne perdus la emon labori plu analize, tolerante niajn malkonsentojn aŭ nian konsentadon nur moderan; kaj klarigante siajn ideojn paciénce, kun kompromisémo.

Estas simile interésa la elpaŝo de Bernard Golden pri kaj por ambaŭtransitivéco. Jes, ankaŭ el la vidpunkto de éblaj róloj de multescia persono tra jardekoj en la esperantista vivo. Konante, eĉ se nur supraĵe, la historion de E-o, kun modera troigo oni póvas díri:

Jén, kíel preskaŭ ĉiu el ni ripétas kaj reripétas fazojn de la ideo-evoluo pli frúa. (Estas bone).

Jén, kíel devas, kun modifoj, ĉio reapéri en la vivo de ĉiu generacío. (Tiel estas).

Kíel reformíntoj konservémas, kaj kiel ekreformas konservíntoj. (Kiel éstas, restos tíel).

Krome: eble ni vidos, kiel reformemuloj konservémos.

Kaj krom tio: venos la tempo de reformado fare de konservemúloj. Oŭ-kej.[15]

Jen, kíel ni provas ĉiamaniere kaj senĉese proksimiĝádi al nia célo, sekvante niajn idealojn. – Ja devas esti tíel.

Amen.

Notoj, literaturo

1) Bernard Golden: *Komplika transitiveco en Esperanto kaj simpligita transitiveco en Ido*. IPR, parto I-II: 1/95, p. 1-12; parto III-a: 2/95, p. 16-21.

2) Johano Petik: *Serve de altaj pretendoj*. IPR, 4/95, p. 29-34.

3/a) Akiko Nagata: *Fremdaj elementoj de Esperanto laŭ la vidpunkto de Japanlingvano*. En: Acta Interlinguistica, Varsovio, 1989, p. 103-10, precipe 109.

3/b) Estas *Mike Sadler*, kiu en IPedRo menciis, ke kursiva presmaniero aŭ substrekado konvénas kiel rimedo de emfazado: Mike Sadler: *János Petik: Serve de altaj pretendoj*. IPR 2/96 p. 28.

4) Petro Rulofido: *La Malfacila Esperanto*. IPR, 4/1995, p. 20-22.

5) Hans Fechler: *Petro Rulofido: La Malfacila Esperanto* – IPR 4/95.

6) "Ĉiu, kiu legis la antaŭparolon de la *Fundamento de Esperanto*, scias tre bone, ke ĝi ne sole ne prezentas ian baron kontraŭ la evolucio de la lingvo, sed kontraŭe, ĝi donas al la evolucio tian grandegan liberecon, kiun neniu alia lingvo iam posedis eĉ parte. Ĝi donas la eblon, se tio estus necesa, iom post iom eĉ ŝanĝi la tutan lingvon ĝis nerekonebleco!

La sola celo, kiun la Fundamento havas, estas nur: gardi la lingvon kontraŭ anarĥio, kontraŭ reformoj *arbitraj* kaj *personaj*, kontraŭ danĝera *rompado*, kontraŭ forjetado de malnovaj formoj, antaŭ ol la novaj estos sufiĉe *elprovitaj* kaj tute definitive kaj sendispute *akceptitaj*." El *Cirkulera Letero al ĉiuj esperantistoj* (18. I. 1908). En: L. L. Zamenhof: Originala Verkaro (kolekt., red. D-ro John Dietterle), Ferdinand Hirt & Sohn en Leipzig, Esperanto-Fako, 1929, p. 445-8, p. 446.

7) Francisko Simonnet: *Ĉu lingvoj devas evolui.* Acta linguistica, Varsovio, 1984, p. 55-70.

8) Mike Sadler: *Bernard Golden: Komplika transitiveco* - IPR 1,2/95. IPR, 2/96, p. 26.

9) Francois Lo Jacomo: *Liberté ou autorité dans l'évolution de l'espéranto.* Thése pour le doctorat de troisiéme cykle sous la direction de M. le Professeur André Martinet. Université paris 5. René Descartes sciences humaines. Sorbonne. 1981.

10) Bertil Nilsson: *Organizita ŝanĝo de Esperanto ne havas ŝancon.* IPR 3/96, p. 32-3

11/a) Aktuala divido de la frazo: 'divido de entekstigita frazo je parto elirpunkta, kvazaŭ antaŭkonata kaj (alia) parto kun nova/esenca informo.

11/b) Fenyvesi, Ervin: *János Petik: Serve de altaj pretendoj - en IPR 4/95.* IPR 3/96, p. 31-2.

12) Nék en la artikolo de Johano Petik, nék en la alparoloj estas menciite, ke ekzistas ankaŭ sintáksa maniero emfazi – per apárta propozicío. Ekzemple: Estas li kiu foriris unua; Estas la knabino kiun ĉiu volas ĝojigi.

Oni ankaŭ ne menciis, ke Karolo Piĉ[16] provis enkonduki la partikulon ste similfunkcie (ekzemple en *Litomišla tombejo* kaj *Klaĉejo*): lia glosa ekzemplo el *Klaĉejo*: ste lin mi atendas. Mi trovas malbóna la ideon, ke paralele ekzistu la vortoj ĝuste, ĝus, (jus) kaj ste, (tiel estas ĉe Piĉ); mi tion trovas malbonašanca sendepénde de la demando pri tradicio, normo, akcepto fare de aŭtoritatoj ktp. – Ankaŭ mí faris iam provon: mi provuzis la partikúlon sa en mia romano *Adolesko* finverkita en 1978. La glosa ekzemplo: Ŝi invítas sa lin 'estas li, kiun ŝi invitis'.

Fine mi mencias, ke ankaŭ la interna lingvo de DLT (Esperanto modifita plejparte laŭ la ideoj de Klaus Schubert kaj grupeto) havis partikulon prifokusan (= je).[17]

13) Pri t. n. aktuala divido de la frazo vidu ankaŭ la artikolon de Attila Salga: *Pri la Esperanto-vortordo en la spegulo de la hungara lingvo.* Budapeŝta Informilo, 1982, 12, p. 20-21.

14) *Nelge*: antaŭ-nelonge.

15) *Ou-kej*: vorto uzata[16] de Karolo Piĉ, kun skribo Esperanta kaj akcento, prononco fiksitaj, por esprimi viglan konsenton kaj kunagemon.

16) Vidu ekz. en: Karolo Piĉ: *Klaĉejo.* Romano. Kun antaŭparolo de Henri Baupierre. Artur E. Iltis. Saarbrücken, 1987.

17) En la interlingvo de DLT oni, por emfazo, uzas la partikúlon je, metatan ne antaŭ, sed póst la vorton emfazatan. Vd. ekz.: R. Eichholz: *Esperanto kiel interlingvo en maŝina tradukado.* En: Akademiaj studoj, 1985, 219-42, precipe 225/ĝ. Vd. ankaŭ: K. Schubert: *A dependency syntax of Esperanto.* En: D. Maxwell – K. Schubert: *Metataxis in practice.* Foris Publications. Dordrecht – Holland/Providence RI – U.S.A, 1989, p. 207-45, precipe 212.

ILONA KOUTNY: Profesoro Szerdahelyi forpasis antaŭ 10 jaroj

(rememoro kaj ĝustigo)

Kun serena vizaĝo rakontas anekdotojn aŭ fervore prelegas – tiel li aperas en mia memoro. Li provis trovi la ĝustan vojon al ĉiuj, transdoni valorajn viverojn. Ni – liaj gestudentoj – ĉiuj ŝatis lin, eĉ tiuj, kiuj poste ne okupiĝis pri E-o.

Ekde la fondo de la E-fako en 1966, li prizorgis ĝin ĝis sia morto en aŭgusto de 1987. Li devis persiste batali kontraŭ ne-esperantistoj kaj esperantistoj (!) por defendi la prestiĝon de E-o. Li pensis, ke la tempo maturiĝis por science okupiĝi pri ĝi en universitata nivelo – kelkaj dubis, neglektis, malrespektis tion, ja por ili movado sufiĉis (kelkfoje eĉ nun mi renkontas similan sintenon!).

Li ne blinde defendis E-on kaj edukis homojn ne rekte por la bezonoj de la movado (la tempo lin konfirmis, ĉar pluraj el liaj eksgestudentoj poste aktive partoprenas en ĝi!). Li per sciencaj metodoj provis trovi la lokon de E-o inter la lingvoj naturaj kaj planitaj, lingvistike analizi ĝin, kaj formi instruistojn, lingvistojn bone informitajn pri E-o. István Szerdahelyi estis bona pedagogo, elstara lingvisto-esperantologo kaj preciza filologo. Vico da studoj kaj libroj montras lian vastan interesiĝon kaj grandan laborkapablon: li prezentis novan aliron al morfologio, semantiko, etimologio; li profunde esploris interlingvistikon, kies rezulto estis la universitata lernolibro pri interlingvistiko kaj la popularа libro "Bábeltől a világnyelvig" (la esperanta versio "De Babelo ĝis la mondolingvo" ŝimas ĉe iu Esperanta eldonejo (!), kvankam el pluraj vidpunktoj ĝi estas pli kompleksa ol la verko de Eco).

Li verkis la bazan studmaterialon por la E-fako (lernolibro, literatura krestomatio, metodologio) kaj trovis tempon ankaŭ por aplikata lingvistiko kaj por prezenti E-on en ne-esperantista medio. Li okupiĝis ankaŭ pri la propedeŭtika valoro de E-o por la lernado de hindo-eŭropaj lingvoj, sed tiu racia propono kaj tiam kaj nun trovas ŝtopitajn orelojn. Li alfrontis la defion de la "meza" Hungara-Esperanta vortaro, kiun li ĉefredaktoris ĝis sia morto (ĝi aperis komence de 1996, finita de I. Koutny) kaj kunlaborigis multajn hungarajn esperantistojn.

Do, li gvidis la fakon dum 21 jaroj, havante regule eksterajn lekciistojn (ekde 1985 ankaŭ mi estis inter ili). Post lia frua, neatendita morto antaŭ 10 jaroj ekestis la ebleco por du postenoj ekde la studjaro 1987/88, kiujn ricevis Varga-Haszonits Zsuzsa kaj mi. Lian skribotablon mi okupis dum 8 jaroj (ĝis la fino de 1995), provis daŭrigi lian laboron kaj konservi la etoson kreitan far li. (Ankaŭ nun mi klopodas sekvi la vojon montritan far li en alia lando, ĉe alia universitato.)

Mi sentas la devon ĝustigi la informojn laŭ la nuna prizorganto de E-fako aperintajn en la 120-a n-ro de Eventoj kaj ankaŭ en IPR 97/2, kies redaktoro li estis iam. Ni ne forgesu, ke li prezidis ILEI (1985-87) kaj donis novan direkton por la instruado de E-o. Nun estas tempo ĝuste kaj estime rememori la agadon de prof. Szerdahelyi. *[Tiu ĉi artikolo aperis ankaŭ en Eventoj N-ro 130 - NdlR]*

d-ino Ilona Koutny,
Instituto de Lingvistiko, Universitato Adam Mickiewicz, Poznań (Pollando)

RENATO CORSETTI: Psikolingvistika esploro pri lernado de E-o

E-o estas lernata en la tuta mondo fare de homoj kun plej malsamaj gepatraj lingvoj, kaj ankaŭ pro tio la fenomeno "lernado de E-o" prezentas tre interesan studokampon por interesiĝantoj pri lernado de dua lingvo. Krome pluraj facetoj de la E-gramatiko estas tiom elastaj ke oni malfacile komprenas la procedojn laŭ kiuj la tuta Esperanto-komunumo tamen alvenas al pli malpli unueca norm-lingvo.

Ĝuste por pli bone kompreni tiujn procedojn du e-istaj psikolingvistoj: *Hiroshi Nagata*, de la japana universitato de Okajamo, kaj *Renato Corsetti*, de la universitato de Romo, entreprenis komunan esplorprojekton, kiu ricevis financan subtenon de la germana *FAME-fondaĵo*.

La lernantoj, progresantoj kaj spertuloj, kiujn oni priesploros, devas esti homoj, kies gepatra lingvo estas la angla, la eŭska, la persa aŭ la rusa. En ĉiu lingvoregiono oni esploros po 30 homojn (10 komencantojn, 10 progresantojn kaj 10 spertulojn). Entute do, oni devas esplori 40 komencantojn, 40 progresantojn kaj 40 spertulojn.

Por ĉi tiu esploro ni difinis jene la tri nivelojn:

- *komencantoj* estas lernantoj de E-o, kiuj lernis la lingvon nur dum 20 instruhoroj, alivorte ili estas partoprenantoj en unuagrada kurso;
- *progresantoj* estas lernantoj de E-o, kiuj eklernis la lingvon en unuagrada kurso antaŭ du jaroj kaj poste daŭrigis la (mem)lernadon ĉu en formala kurso, ĉu per vizito de E-klubo kaj legado de revuoj aŭ libroj en E-o.
- *spertuloj* estas esperantistoj, kiuj flue parolas la internacian lingvon kaj eklernis ĝin antaŭ minimume 5 jaroj.

Pro la varieco de la lern-situacioj estas relative malfacile precize difini "progresantojn" surbaze de fiksita nombro da lernohoroj. Post la unua kurso kelkaj vizitas formalan duan kurson aŭ konversacian kurson, kelkaj simple ekpartoprenas la E-movadon kaj lernas per praktiko, ktp. Ĉiukaze en ĉi tiu esploro "progresantoj" estas homoj, kiuj plulernas E-on sed ankoraŭ havas problemojn se ili devas skribi aŭ paroli en ĝi. La esplor-tasko konsistos el legado de frazoj en E-o, kies gramatikecon la partoprenantoj devas prijuĝi, kaj el verkado de mallonga teksto, kiu priskribu ricevotan bildon.

Ni turnas nin al la ILEI-sekcioj kaj al konataj instruantoj de E-o en la landoj en kiuj la koncernaj lingvoj estas parolataj.

Ni esperas ke vi, ricevanto de ĉi tiu komuniko, anoncos vian pretecon kunlabori pri ĉi tiu eksperimento, kies rezultoj estos metataj je dispono de la esperantlingva komunumo, sed eble povus ankaŭ interesi neesperantistajn studantojn de lingvoakirado.

Anoncu vian pretecon partopreni ĉe: *Renato Corsetti, Colle Rasto, IT-00036 Palestrina, Italio. Tel. +39-6-9575713. Ret-adreso: corsetti@itelcad.it*

Didaktika panelo baldaŭ akirebla?

Tiu panelo, taŭga ilo por E-Kluboj, farita por la pasintaj Skoltaj Ĵamboreoj en Nederlando, estis jam multfoje uzita dum Informborsoj en diversaj lokoj en Belgio kaj Francio. Junuloj kaj plenkreskuloj scivoleme ludas per tiu panelo; ili entuziasme eklernas, laŭ agrabla maniero, tre rapide kelkajn bazajn E-regulojn.

Oni vidas klare la konstruaĵon de la lingvo. Se oni trovas la bonan respondon, iu bruo "piiip" estas bone aŭdebla. Tio facile venigas aliajn interesulojn. Jam kelkaj E-klubestroj demandis, ĉu tiu panelo estas aĉetebla en facile transportebla formato. Tio eblas nur, se sufiĉe da kluboj estas interesitaj.

Informoj: *A. Bouman, Driesdreef 8, BE-9030 Belgio. Tel/fakso: +32-(0)9227 4841*

Konigu Esperanton al neesperantistaj infanoj

Postsekvante la vojon de *Grajnoj en Vento* aperas entrepreno sub la nomo *Infanoj en la mondo.*

Celo - Informi kaj motivigi geinstruistojn kaj gelernantojn de elementaj lernejoj pri E-o..

Partopreno - Povas partopreni ĉiu lernejo, lernantklasoj, kaj grupo de geknaboj sin organizitaj por la celo. Ĉiujn el ili ni nomos: sekcio.

Procedo - Ĉiu sekcio sendas al la Centra redaktejo sian kunlaborajon, kiu estas: 6 folioj kun desegnoj kaj/aŭ teksto, unu aŭ duflanke, diversaj aŭ egalaj, ĉi-lastaj eblas esti multobligitaj.

Kunlaborajoj - Nepre la mezuroj estu 21 x 28 centimetroj. Ordinara papero, ne diketa. La koloro estas libera. Nepre la tuta teksto estu en E-o. La sekcio petos helpon de esperantisto por la traduko. Tamen se estas manskriba, ĝi estu farata de la verkintoj mem, kopiante la tradukon.

Temoj - Evitu abstraktajn, ne desegnu aŭ ne verku pri nacia historio, politiko kaj elstaruloj, ĉar internacie ili ne kompreniĝos. Verku pri via familio, via urbo, via lernejo, viaj geamikoj, viaj ĉiutagaĵoj. Pri ĉio, kion vi travivas kaj vidas.

Organizado - La Centra Redaktejo, ricevinte la 6 foliojn, kunigas ilin kun samnombraj ricevintaj el 5 diversaj landoj. Ĝi bindas ilin en 6 staplojn, tiel ke ĉiu el ili havu 5 foliojn el 5 diversaj landoj. Tuj poste la Centra Redaktejo sendas po 1 ekzemplero al ĉiu ano de la sekcio. La sesa estas konservata por la arkivo.

Financado - Ĉiu sekcio kun la kunlaboraĵo sendas sian kontribuon 3 respondkuponojn aŭ 3 usonajn dolarojn por la poŝta sendo de la ekzemplero. Se estas oportune oni povas fari la transpagon per ĝirilo de UEA, nome de Enrique Kohei, kodo *enko-*

k. Al eventualaj apogantoj oni petas monhelpon por nepagopovaj sekcioj kaj ceteraj elspezoj.

Centra Redaktejo - Sekve la adreso por sendi la materialon: *S-ro Enrique Kohei, Infanoj en la Mondo, Casilla Correo 407, 2600 Venado Tuerto, Argentino.* La partopreno estas aŭtomata, ne atendu, jam sendu la materialon.

Enrique Kohei, kohe.solis@waycom.com.ar

El la landoj kaj sekcioj

Argentino

Inter la 9-a kaj 11-a de oktobro 1997 okazos *la 4-a Interlanda Konferenco pri Instruado* kaj la *51-a Argentina E-Kongreso.* Okazos ankaŭ ekzamenoj por la elementa kaj meza niveloj.

Aliĝadreso: *Díaz Colodrero 2546 P6 B, AR-1431 Buenos Aires, Argentino*

Aŭstralio

Cseh-kurso kaj seminario dum UK

La tradiciajn aranĝojn de IEI ankaŭ ĉi-foje partoprenis multaj kongresanoj. Dum la seminaria laboro 8 personoj (el 8 diversaj landoj kaj 4 kontinentoj) studis la faman metodon kaj observis la paralele okazigitan lingvokurson por komencantoj. Tiun lastan regule frekventis ĉ. 15 lernantoj, sed pliaj 25 venis por nur unu-du tagoj. La aranĝoj havis sukceson, la lernantoj lernis multe en amuza maniero kaj espereble ricevis grandan puŝon por la plua lernado de la lingvo. Okazis ankaŭ prov-instruadoj de la seminariaj kandidatoj, kiuj en 5-minutaj prezentadoj pruvis al la gvidantino, Katalin Smidéliusz, ke ili komprenis la esencon de la metodo, eĉ kapablas apliki kelkajn el inter ties bazaj teknikeroj. La organizantoj esperas, ke ĉiu kandidato daŭrigos sian studon kaj aliĝos al la sekva ŝtupo (grado B) de la formado de Cseh-metodaj instruistoj.

Laŭ La Lumilo *(Kongresa Kuriero 5, dum UK '97)*

Finnlando

4-a Esperanto-semajno en Tampere (21-27.6.97)

E-kurso por daŭrigantoj, kun 7 finnaj lernantoj, studis entuziasme. Ilin instruis magistro *Atilio Orellana Rojas.*

Temo de *diskutrondo* estis E-kulturo. Ĝin partoprenis 12 e-istoj, krom finnoj ĉeestis germanino kaj zairiano, loĝanta en Finnlando. Ĉiuj tagoj havis proprajn temon kaj gvidanton.

Lundo: *Literaturo* (kun gvido de Markku Saastamoinen). Oni konstatis, ke la fundamento de literaturo estas *Biblio.* Ĝi influis kaj influas multe ankaŭ literaturon

dum multaj jarcentoj. Alia efikilo por literaturo estas la popola vivo.

Mardo: *Elektra medio* kaj *Gazetaro* (Jukka Laaksonen kaj Markku Saastamoinen). Estas jam pluraj E-radioj kaj preskaŭ ĉiuj estas aŭdeblaj de tempo al tempo. La du, plej ofte aŭskultataj radioj estas Pola Radio kaj Radio Aŭstrio. Radion Pekino eblas aŭskulti, sed malbone, kaj la sendotempo estas tro malfrua por finnoj. Plej moderna ilo, interreto donas nuntempe multe da informoj pri E-o kaj estonte eble eĉ pli multe ol aliaj elektraj medioj.

Pri gazetoj. Finnaj E-aktivuloj abonas ĉ. 10 gazetojn, aliaj eble nur unu. Sperto estas, ke kelkfoje komencas aperi novaj gazetoj, kiuj kolektas abonojn, ricevas monon, sed aperas nur kelkaj aŭ nur unu numero. Oni diris, ke e-istoj prefere devus havi 20 bonajn gazetojn ol 200 malbonajn. Malgrandaj lokaj gazetoj estas bezonataj por ke ankaŭ novaj e-istoj, kun nesufiĉa lingvoscio, kuraĝu skribi al ili.

Merkredo: *Personaj kontaktoj* (Sylvia Hämäläinen). Korespondado estas komenco de multaj personaj kontaktoj. Korespond-aktiveco estis varia, kelkaj havis multajn amikojn, kelkaj nur unu aŭ neniun. La retpoŝto donas novajn eblecojn por la korespondado. Grava kontaktmaniero estas ankaŭ ĝemelurbaj kontaktoj. Tampere havas 16 ĝemelurbojn kaj en preskaŭ ĉiuj troviĝas e-istoj, kun kiuj ni havas kontaktojn. Mankas nur unu ĝemelurbo, Syracuse en Usono.

Ĵaŭdo: *Internaciaj kongresoj* (Pentti Järvinen). Internacia kongreso estas la plej bona loko konatiĝi kun novaj homoj kaj komenci amikajn rilatojn, kiuj daŭras tra la vivo.

Vendredo: *UEA* (Jukka Laaksonen). S-ro Laaksonen rakontis pri la organizo de UEA kaj poste la grupo diskutis pri la Manifesto de Prago kaj Kampanjo 2000: ĉu UEA devas doni ankaŭ detalajn instrukciojn pri ĝi aŭ ĉu sufiĉas nur la celo kaj ĉiuj povas elpensi propran manieron realigi kaj atingi la celon.

Mardo: Atilio Orellana Rojas rakontis pri *Argentino kaj Sud-Ameriko.* Merkrede li montris lumbildojn pri indiana karnavalo kaj rakontis pri ilia kulturo.

Inter vesperaj programoj estis i.a. vizito al la internacia renkontejo de Tampereo kaj la nova klubejo NESTO de E-societo *Antaŭen.*

La loko de la aranĝo, lernejo de Ahlman, situas ĉ. 8 km-ojn de la urbocentro de Tampereo, kaj ĝi estas ege bona por E-semajno.

***Sylvia Hämäläinen**, sekretariino de ELFI*

Blua aventuro

Kunlabore kun la Somera Universitato de la urbo Jyväskylä kaj la E-klubo de la sama urbo estis aranĝita studsemajno *Blua aventuro* 30.6 - 4.7.97. Partoprenis 18 studantoj, el kiuj 2 eksterlandanoj. Ĉiuj temoj de la progresantoj kaj konversaciantoj rilatis akvon: akvomanko, dezertiĝo, akvopurigado, lagoj kiel ekz. *Bajkalo* kaj *Patagonia lagaro*, diluvo. Krome okazis ekskursetoj remante, krozadante, piedirante laŭ rivervalo. Aldone ni povis konatiĝi kun akvorilataj proverboj, viziti muzeojn, kantadi kaj aktori. La progresantojn kaj la konversacio-rondon gvidis Atilio Orellana

Rojas, la komencantojn la landa sekciestrino, plejparte laŭ la rekta metodo. Ekzamenoj ne okazis, sed ĉiuj ricevis atestilon pri la partopreno.

Ni havis bonegajn modernajn klasejojn, bongustajn manĝojn kaj komfortajn unuaŭ plurlitajn ĉambrojn, komunan kuirejon kaj fridujon por vespera kaj nokta uzo, saŭnon kaj naĝbasenon. En 1996 la temo de la simila *Verda aventuro* estis "arbaro". Ni vidu, kiu temo estos elektita por la jubilea, 30-a studsemajno en 1998!

Raita Pyhälä, sekciestrino de ILEI en Finnlando

Francio

Esperanto-Vaucluse okazigis Cseh-seminarion la 10-11-12-ajn de januaro 1997 sub gvidado de la argentina lingvisto Atilio Orellana-Rojas. La unua parto de la seminario okazis dum marto 1995. La tria okazos en 1998 dum la Universala Kongreso de Montpellier. El la *Ekspresa Rubriko* de *Franca Esperantisto*, 97 marto

En la Scienca Universitato de Marseille malfermiĝis nova kurso *Interlingvistiko kaj Esperanto*. Temas pri trihora kurso, kiu daŭras 13 semajnojn. Ĝi estas unu el la 20 devigaj fakoj de la unua universitata ciklo. Ĝin gvidas Michel Challulau.

Renée Triolle

Irano

Ekde la 6-a de januaro 1997 estas lanĉita Mazi-kurso en *Golha* kulturdomo kiun gvidas M. Reza Torabi. La kurso konsistas el Mazi kaj rekta metodo de Cseh. Post la akiro de la rezulto oni decidos pri la okazigo de similaj E-kursoj en aliaj kulturcentroj.

Reklamante en la nacia gazetaro, IREJO lanĉis korespondan E-kurson tra la lando. La instrua komisiono en IREJO respondecas pri la programo. En la komenco aron da leteroj ni ricevis, en kiuj oni, postulante detalajn informojn pri la kurso, entuziasmiĝis eklerni la lingvon kaj al ĉiuj estis sendita detalaj informoj pri la kurso. Jam estas ricevita el 70 urboj pli ol 200 leteroj.

En Teherano de antaŭ tri jaroj IREJO okazigas E-kursojn en kulturcentroj kaj tiel aperadas novuloj, plej ofte gejunuloj. La novaj membroj de IREJO dum la nova jaro konsiderinde kreskas pro la okazigo de tiuj kursoj kiuj sukcese estas aranĝitaj.

laŭ IREJO-Bulteno 17/18, februaro-marto '97 kaj Interredaktore

Pentroinstruado pere de Esperanto

Pentra instruisto deziras instrui pentradon Esperante, en diversaj partoj de la mondo. Lia celo estas disvastigi E-on helpe de pentra arto. Evidente tiu ĉi afero bezonas helpon kaj kunlaboron de E-asocioj, institutoj, organizoj kaj kluboj.

Se oni deziras profiti tiun ĉi eblecon kaj ricevi pliajn informojn bonvolu kontakti kun: Prof. M. P. Habibpur, P. O. Kesto 14645-133, Tehrano, Irano. Telefono: +98 21 2067136 aŭ lia organiza adreso: Sabz Andishan Instituto, P.O. Kesto 17765-184 Tehrano, Irano, Tel.Fakso: +98 21 6626913, Retpoŝto: IREJO@neda.net

Japanio

En aprilo 1998 komenciĝos E-klaso en supera mezlernejo en Yokohama, Japanio. Estos la unua fojo, ke oni instruas E-on kiel oficialan lerno-objekton en tia lernejo en Japanio. Estas esperate, ke junaj esperantistoj sendos leterojn aŭ bildkartojn venontjare al *Nippa Kôkô, 1348 Nippa-chô, Kôhoku-ku, Yokohama, 223 Japanio.*

Kroatio

Familiare kunaj - *Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj*

Strange tie, apud lazura maro, kiel plora infana voĉo 'Panjo' aŭ 'Paĉjo', tuj vokis la atenton de deko da gepatroj. Ĉar ... esperantistaj familioj estas eksterordinaraj fenomenoj, kaj kutime izolitaj - se hejm-loke aŭdiĝas ĝemo 'Paĉjo', tio povas celi nur onin, ĉiu alia E-paĉjo foras je multaj kilometroj. Sed tie en Savudrija, julio-fine, ŝvebanta ĉe la sojlo de Kroatio, trideko da Paĉjoj, Panjoj partoprenis, por ne paroli pri plia trideko da junuloj, de beboj enbrakaj ĝis burĝonintaj adoleskoj. Jen la 19-a REF, Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj. Tiuj unikaj aranĝoj restas iom nekonataj ekster la tradicia rondo de la partoprenantaj E-familioj, nur tri el la familioj ne estis veteranoj de REF. Kiu spertis, revenas, kaj multaj el la infanoj reprenas ĉiujare bonajn kaj profundiĝantajn amikecojn.

Kun tia maro apude, nur ne-densa kaj mem-krea programo konvenis, kaj tiel okazis. Ĉiutage komunis kantado, ludado, desegnado, kastel-konstruado por la infanoj, kun spert-interŝanĝoj kaj terminologiaj diskutoj por la gepatroj.

Decidite, ke la jubilea 20-a REF okazu julie en okcidenta Hungario; detaloj aperos siatempe en IPR. Ĉiu familio kun infanoj kapablaj paroli Esperanton estas bonvenaj. Ne timu, jam ene de tri/kvar tagoj, oni trejnas sin ignori la senfinan serion da korŝiraj 'Pan/ĉjo'-alvokoj kaj kompreni, ke tio estas ja parto de la unike esperanta familiara etoso.

smg


Pollando

Esperanto en Jagiellona* Universitato

En unu el la plej malnovaj eŭropaj universitatoj, la Jagiellona Universitato en Krakovo, gestudentoj studas E-on, en I- kaj II-gradaj kursoj. Ĉiu grado estas unujara, ampleksas 6 studhorojn semajne. La I-grada kurso havas la titolon *Esperanto-lingvo kaj kulturo*, la II-gradan konsistigas jenaj studobjektoj: historio de la ideo de internacia lingvo, elementoj de interlingvistiko, historio de E-o, esperantaj literaturo kaj lingvistiko, praktika studado de literatura lingvo. Ĉiu grado finiĝas per speciala ekzameno, skriba kaj parola, kun oficiala takso, enskribata en la studlibreton de la studento.

E-o povas esti elektata kiel unu el la devigaj studobjektoj ĝenerale, aŭ unu el devigaj lingvoj (ĝi povas anstataŭi kiun ajn lingvon, inkluzive la anglan, se tiu estas la elekto de la studento). En la fakoj kun poentsistemo studentoj ricevas por la studado

de E-o oficialajn poentojn.



La Universitato intencas enkonduki diplomon por instruado de E-o, analogan al tiuj de ĝi por aliaj lingvoj. Por prepari sin al diplomiĝo, gestudentoj regantaj la lingvon povos sekvi metodikan studadon, samnivelan kaj organizitan laŭ la sama programo, per kiu oni preparas en la universitato instruistojn de aliaj lingvoj. La instruprogramo komenciĝis en 1995. Jam en la unua jaro ekinteresiĝis pri ĝi pli ol 30 gestudentoj. La tutan programon aŭtoras kaj gvidas Maria Majerczak, specialistino pri trejnado de instruistoj de fremdaj lingvoj kaj lingvistiko en ĉi tiu universitato, gvidantino de la pola sekcio de ILEI.

Gestudentoj estas kuraĝigataj ankaŭ science esplori E-on kaj iuj aktive partoprenas i.a. naciajn ILEI-Konferencojn aŭ prelegas pri esperantaj temoj dum aliaj, neesperantaj, universitataj kursoj. La kurso estas destinita por ĉiuj studentoj de la universitato, estas akceptata studentoj ankaŭ de aliaj krakovaj superaj lernejoj. Kompreneble, ili venas el diversaj urboj de la tuta lando.

Ekzistas ankaŭ, gvidata de Maria Majerczak, studenta esperanta teatro kaj kabareto, kiu donis jam sukcesajn prezentadojn. Por estontaj instruistoj tio estas maniero ekzerci ankaŭ belan, klaran elparolon – kiun oni tre insistas en la programo – kaj aktoradon en klaso. La lernado okazas en malnova universitata domego, najbara al la famega *Collegium Maius*, la plej malnova domo de la universitato, kun unika muzeo pri ties historio, vizitata de multaj turistoj kaj ĉiuj oficialaj reprezentantoj de aliaj landoj. En la muzeo troviĝas i.a. memoraĵoj de Nikolao Kopernik, kiu studis en ĉi tiu universitato (simile, la nuna papo, Johano Paŭlo la II-a).

La gestudentoj volonte montros la urbon al eksterlandaj esperantistoj, kiuj antaŭanoncos sin (krom dum ekzamenperiodoj), korespondos (la aĝo ne gravas), iuj interŝanĝos vizitojn. Ili danke akceptos ankaŭ informojn pri internaciaj laborbrigadoj por esperantistoj, ktp. Bv skribi al: Maria Majerczak, ul. Armii Krajowej 7/122, PL-30150 Kraków, Pollando. *[Sur la foto: fragmento de la ekspozicio en la Universitato]*

**En la esperanta tradicio en Pollando estas longe uzata la vorto "Jagiellona" anstataŭ la PIV-a "Jagelona". Ĝi pli konformas al la originala "Uniwersytet Jagielloński".*

Rusio

La E-Klubo de Murmansk festis sian 9-jariĝon la 25-an de februaro 1997. Okaze de tio oni aranĝis ekspozicion en la regiona scienca biblioteko kaj aperigis artikolon en la ĵurnalo Murmanskij Vestnik. Krome kvar lokaj esperantistoj 20 minutojn parolis pri la internacia lingvo kaj pri la loka E-Klubo en la por-marista radioelsendo Atlantiko.



Finante la programon oni anoncis senpagan E-kurson, al kiu komence aliĝis 50 homoj. La kurson vere frekventas iom pli ol 30 personoj. La kursanoj uzas la lernolibron de M. Abolskaja. La kursanoj estas diversaĝaj, de 10,14, 15 ĝis 65-jaraj. Ili jam ŝatus havi siajn unuajn E-amikojn. Gratulu ilin kaj skribu laŭ la adreso de ilia kursgvidanto: Aleksas Masiukas, prosp. Lenina 101-26, RU-183012 Murmansk, Rusio

[Sur la foto: grupo de la lokaj aktivuloj. Maldekstre sidas la prezidanto de la klubo, A. Liĉ, en la fono staras A. Masiukas]

Svislando

[NdlR – En nia antaŭa numero ni citis kelkajn notojn de nia svisa sekciestro, kiu partoprenis la 45-an sesion de la Internacia Buroo pri Edukado organizitan en Ĝenevo, 30.9-4.10.1996. Pro manko de spaco ni ne povas aperigi ŝian kompletan raporton kaj la dokumentojn de la konferenco, sed staru ĉi tie kelkaj ŝiaj konkludoj pri la evento:]

"Estas tre grave, ke homoj el E-medio partoprenu tiajn kunsidojn. Ili ne povas alparoli la kunsidantojn, tamen oni legas iliajn nomojn en la partoprenlisto. Ili ricevas enirpermeson, ili ricevas ĉiujn dokumentojn, ili povas ekrilati kun aliaj homoj dum la paŭzoj, ili povas disdoni varbilojn pri E-o. Do, la partoprenantoj ekscias pri E-o. UNESCO havas "kapon" (centran sidejon) en Parizo kaj tri "membrojn", unu en Ĝenevo (BIE), unu en Parizo (Internacia Instituto por Pedagogia Planado), kaj unu en Hamburgo (UNESCO-Instituto por Edukado). ILEI devus tre regule informi tiujn centrojn per nacilingvaj varbiloj/informiloj (sendi IPR-on, "Service de Presse" de SAT por Ĝenevo kaj Parizo, Inform-servon de GEA por Hamburgo) kaj eĉ peti pri regula reprezentado. Mi petas la komitaton de ILEI esplori tiun aferon.

Adresoj: *Bureau international de l'Education* BIE, case postale 199, CH-1211 Genève 20 Tel. +41 22 798 14 55. Stratadr: 15, route des Morillons, CH-1218 Grand-Saconnex

UNESCO-Institut für Pädagogik, Feldbrunnenstr. 58, DE-20148 Hamburg, Tel. +49 404 48 0410

Institut international pour la Planification pédagogique (IIPP)

UNESCO, place Fontenoy, FR-75352 Paris 07 SP

***Mireille Grosjean**, sekciestro de ILEI en Svislando*

Ukrainio

En ĉi tiu lernojaro en Nikolaevo E-o estis instruata eksterprograme en tri mezlernejoj, kun partopreno de 52 gelernantoj kaj du geinstruistoj (s-ro Mark Naumoviĉ Heller kaj s-ino Olga Vdoviĉenko). Estis kursoj pri E-o ankaŭ en la Pedagogia Instituto (s-ro Vladimir Hordienko). Ne estas ankoraŭ klare – pro ekonomiaj kondiĉoj – kio okazos en la sekva lernojaro.

Grand-Hipanis, baza, neŝtata klerigejo en Nikolaevo serĉas kontaktojn. Ĝi edukas divers-naciajn infanojn. La lernejo celas atingi, ke la infanoj samtempe alkutimiĝu al ukraina etoso kaj konservu animon de sia nacieco (armena, bulgara, greka, hebrea, rusa ktp.). En la klerigejo lernas senpage 10 orfoj. Ili volas kontaktiĝi kun lernejoj edukantaj divers-naciajn infanojn, por kunlabori kaj interŝanĝi spertojn. Ili pretigas enprogramigon de Esperanto. Direktoro: *Ludmila Matvienko, ul. Dekabristov 26, kv. 2; UA-327001 Nikolaev, Ukrainio, e-poŝto: formail@comcent.nikolaev.ua (por abon. 062)*

Informis: *Olga Vdoviĉenko, formail@comcent.nikolaev.ua(por abon. 058)*

Usono

Internacia agado en San Francisko

Esperantistoj el kvar kontinentoj kaj naŭ landoj kunvenis ĉi tiun printempon dum kvar apartaj tagoj por aktore provludi kaj poluri la unuajn kvar lecionojn de la farata videobenda kurso "Pasporto al la Tuta Mondo" celata al televida dissendado. Profesoro Paul Gubbins reverkis la manuskripton de ĉi tiu interesa rakonto pri la aventuroj de la Familio Bonvolo kaj ties gastoj. La video malsimilas al "Mazi" en tio, ke ĝi uzas

vivantajn aktorojn anstataŭ desegnaĵoj, kaj celas pli aĝajn lernantojn. Ĝi enkondukas kaj Esperantan kulturon kaj nian lingvon.

La kompleta instru-vidbendo, kune kun akompanaj laborkajeroj kaj ekzercoj haveblos laŭplane post tri jaroj. Ankoraŭ estas bezonataj subvencioj kaj antaŭmendoj.

La unuaj kvar lecionoj de la serio pretos antaŭ la fino de la jaro 1997. Antaŭmendoj de la unuaj 4 lecionoj kostas 85 USD, kaj antaŭmendoj de la tuta serio de 15 lecionoj ankoraŭ kostas nur 300 USD.

Detaloj haveblas de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko (ELNA), *P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530 Usono, fakso +510-531-0152.*

Por plia informo: *Lucille C. Harmon, ELNA Videobenda Projekto, 2389 Thackeray Drive, Oakland CA 94611 Usono*, e-poŝte *LusiHarmon@AOL.com.*



Sur la foto: lernantoj Katie Kohlburn kaj Ryan Lathrop malalfiksas desegnaĵojn por sendi ilin al Kroatio por ekspozicio aranĝita de la Kroatia Esperanto Unuiĝo. Lernantoj de Kolombus-a Lernejo en Edwardsville, Illinois (urbeto apud Sankta-Luiso) en Usono sendis 60 afiŝojn, kiuj portas nov-jarajn mesaĝojn en E-o. (Fotis: Steve Brown)

Renée Triolle: Inventemaj investoj

(fragmento de la Estrara Raporto de UEA: aperis en "Esperanto" junio 1997)

Por ankaŭ tiel pravigi konstantan kunlaboradon kun Unesko, UEA devus pli inventeme investi en edukado ĝenerale. Temas ja pri kampo pli vasta ol nur Esperanto-instruado, pri kiu respondecas ĉefe ILEI. Bona ekzemplo ja estis en 1996 la venigo de juna zairia Unesko-stipendiulo, Nkunku Niansi, al stud- kaj prelegvojaĝo

en Francio, Belgio, Nederlando kaj Germanio. Li prelegis i.a. pri proverboj de sia lando, respegulantaj la popolan saĝon. Tio estis bona okazo por konsciigi la aŭskultantojn ke ne sufiĉas kompreni la lingvon por kompreni la signifon.


Ĝenerale 1996 estis bona jaro por instruado. Korespondaj kursoj estis senpage proponataj en Kimrio; ili startis en Italio kaj estis preparataj en Islando. Sukcesaj ili estis en Pakistano, kun 150 lernantoj. Sur la bazo de 10-leciona kurso el Usono, pretiĝis retpoŝta kurso de Esperanto en la hispana lingvo. Aperis la lingvo-instrua KD-ROM Travel Talk, por parolantoj kaj lernantoj de la angla, nederlanda kaj Esperanto. En oktobro la Pola Televido ekelsendis adaptajon de la kurso Mazi en Gondolando. La universitato de Sieno (Italio) starigis korespondan E-kurson por lingvoinstruistoj. Malfermiĝis kursoj ankaŭ en la universitatoj de Havano (Kubo), Valencio (Hispanio), Bariloĉo (Argentino), Namuro (Belgio) kaj Perto (Aŭstralio), dum malaperis tiu en Aix (Francio), gvidita de Michel Duc Goninaz.

Seminarioj por plialtigi la lingvan aŭ instruan nivelon de E-instruistoj estis organizitaj ekz. en Italio, Danio kaj Norvegio. Fondiĝis E-Esplora Centro en Shijiazhuang (Ĉinio). E-kursoj en Universitato de Tria Aĝo aŭ simila institucio funkciis almenaŭ en Britio (8), Aŭstralio (6), Brazilo (1), Ĉinio (2), Francio (3) kaj Italio (2). Ankaŭ en 1996 bone sukcesis la tradiciaj kursoj en la usonaj San-Francisko kaj Hartford, same kiel en la Popola Altlernejo de Karlskoga (Svedio).

Ĉe la kruciĝo de edukado kaj instruado estis la interŝanĝo de infanoj inter Katalunio kaj Bosnio, kaj Kievo (Ukrainio) kaj Tuluzo (Francio). Orfoj el Sankt-Peterburgo (Rusio) feriis en Danio, kie Esperanto fariĝis ne nur la komuniklingvo sed ankaŭ portanto de solidareco. La Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI havis nombre malpli bonan sukceson ol kutime. Okazis 12 sesioj en 8 landoj, kun 30 sukcesintoj en la elementa kaj 15 en la meza niveloj. Por Koresponda Servo Mondskala la jaro signifis grandan kreskon de la agado, dank' al efika diskonigo de tiu malnova servo de UEA en la E-gazetaro: 579 petleteroj kompare kun 362 en 1995.

Bedaŭrinde estis ke la alvoko al eŭropa kunlaboro ne ricevis reagon. Tio pruvas la malfacilecon kunordigi plurlandan agadon, eĉ se la koncernaj respondeculoj en ILEI kaj UEA opinias tion ebla. *(Fino)*

Postparolo de la redaktoro – *Laŭ la pariza decido de nia estraro, ni modifis la fermon de tiu ĉi numero de la 15-a al la 31-a de aŭgusto. Planata redaktofino por la sekva numero: la 31-a de oktobro 1997. Danke al Johano Pachter (Berlino), nia IPR-arkivo preskaŭ kompletiĝis. Mankas nur la ekzemplero 1/80. Se vi povas, bv. helpi. Titolpaĝe nia "nova" ISSN-numero. Ni ricevis ĝin en la jaro 1988!* J.N.



Ĉu vi kuraĝis reveni sen aboni EVENTOJ-n?

SEKCIESTROJ de ILEI

Albanio: Bardhyl Mezini, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, Tirana
Argentino: Teresita Alaniz, Hipólito Yrigoyen 2578 P5 Dto 30, AR-1090 Capital Federal
Aŭstralio: Jennifer Bishop, 39 Hill Street, Hawthorn, Victoria 3122
Aŭstrio: Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, AT-1190 Wien
Belgio: Raymond Wylleman, A. Vermeylenstr. 65. BE-8400 Oostende
Brazilo: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106-010 Sao Paulo (SP)
Britio: Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 8QD
Ĉeĥio: Miroslav Malovec, Bosonozská 15/10, CZ-625 00 Brno
Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan
Finnlando: S-ino Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, FI-69440 Lestijärvi
Francio: Fernand Micoud, 8 rue des Maures, FR-69320 Feyzin
Germanio: Michael J. Scherm, Von Thürheimstr. 47, DE-89264 Weissenhorn
Hungario: József Németh, Kilián ltp. 75/9, HU-8500 Pápa
Italio: Maŭro La Torre, Viale Bardanzellu 117, IT-00155 Roma
Japanio: Masumi Suzuki, Inokashira 3-5-12, Mitaka-shi, Tokio, 181 Japan
Kroatio: Ivan Bekavac-Basić, Kuŝlanova 59. HR-10000 Zagreb
Kubo: H. Jiminéz, Apartado 5120, CU-10500 Ciudad de la Habana
Nederlando: Hans ten Hagen, Middenweg 587, NL-1704 BH Heerhugowaard
Norvegio: Björn Thuv, Aröyveien 33, NO-3135 Torod
Rumanio: Prof. Popa Florica, Str. Eroilor 29, ap.7. RO-1900 Timisoara
Rusio: Irina Gončarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-143000
Svedio: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-24294 Hörby
Svislando: Mireille Grosjean, Rue du Temple 20, CH-2416 Les Brenets
Usono: Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111-2521, Usono

REPREZENTANTOJ de ILEI

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv. 52, AM-375062 Erevan
Bharato: Abani Halter, Jamboni, P.O. Bolpur 731204, W. Bengal
Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta Kulenoviĉ, Branilaca grada 17/V, BIH-71000 Sarajevo
Bulgario: Kiril Velkov, D. Todorov 9, BG-3000 Vraca
Ĉilio: Héctor Campos Grez, Casilla 231, Curicó, Séptima Región
Danio: Wolfgang Kirschstein, Hvedebjergvej 30, DK-8220 Brabrand
Estonio: Eve Otse, Liivalaia 30-12, EE-0001 Tallinn
Hispanio: Pedro M. Martin Burutxaga, Ctra. Estació 2 A-5-2, ES-17300 Blanes (Katalunio)
Irano: Hamzeh Ŝafii, P.O. kesto 13445-915, Teheran
Islando: Loftur Melberg, Skolabraut 1, IS-220 Hafnarfjördur
Israelo: Murjan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv
Jugoslavio: Radojica Petrovic, Bul. Oslobodjenja 36, YU-32000 Cacak
Kostariko: Jorge A. Leoni de León, Apartado 7603, CR-1000 San José
Koreio: So Ĵin Su, Dept. de Ekonomiko, Universitato Kangnam, Kugali Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900
Litovio: Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LT-2044 Vilnius
Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1.
Pollando: Maria Majerczak, ul. Armii Krajowej 7m. 122, PL-30150 Krakow
Portugalio: João Santos, p-a Portugala Esperanto-Asocio. Rua Dr. João Couto 6 r/c A, PT-1500 Lisboa
Sanmarino: Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, SM-43031 San Marino.
Slovakio: Anton Zachariás, Sobotské námestie 6, SK-05801 Poprad.
Slovenio: Marija Zlatnar-Moe, Miliĉinskega 66, SI-1000 Ljubljana
Tanzanio: Mramba Simba, S. L. P. 1051, Bunda Mara
Togolando: Afantchao-B.Yao, B.P. 20225 Lome
Ukrainio: Svetlana Fedotova, P.O. Kesto 88, UA-253222 Kiev
Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Ab. kesto 140, UZ-700000 Taŝkent, CIS
Venezuelo: Prof. J.E. Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A
Zairio: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre)

LABORKOMISIONOJ

Didaktikaj ludoj: Georges Sossois, rue du Basson 79, BE-6001 Marcinelle, Belgio; tel. (+32 71) 43 62 05

Eksteraj rilatoj: Raymond Wyllemann - Belgio (prezidanto), Marija Beloševiĉ - Kroatio, Marcel Delforge - Belgio, Ronald Glossop - Usono, Mireille Grosjean - Svislando, Francois Lo Jacomo - Francio, Bruno Masala - Francio

Ekzamenoj: prez.: Mag. Atilio Orellana Rojas (adreso, kovrilo 2). Sekretario de elementa kaj meza niveloj: Hans ten Hagen, (adreso, kovrilo 3)

Elekto komisiono: Agneta Emanuelsson - Svedio, Doroteo Holland - Usono, Gwenda Suttun - NovZelando

Eŭropa Komunumo kaj informado en pedagogiaj medioj: Raymond Wylleman

Gazetara servo kaj informado: *vakas sed pretas kunlabori:*
Germain Pirlot, Steenbakkerstr. 21, BE-8400 Oostende; tel. (+32 59) 70 87 00 kaj Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, AT-1190 Wien, Aŭstrio; tel. (+43 222) 36 86 29

Konkursoj lernejaj: Géza Kurucz, Nyíri u. 11, HU-6000 Kecskemét, Hungario

Lerneja kontaktigo kaj statistikado: Provizore plenumata pere de *Juna amiko*

Statuto: Rob Moerbeek kaj Hans ten Hagen

Terminologio: Maŭro La Torre, Viale Bardanzellu 117, IT-00155 Roma, Italio

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

IEI: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag

UEA: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

UNESKO: (rilatoj de reciproka informado, kat. C): Place Fontenoy, FR-75007 Paris
Reprezentanto de ILEI: François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, FR-75010 Paris

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

La membreco inkluzivas ricevon de kvar numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksos kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto.

Kasisto de ILEI: *Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby, Svedio; poŝtĝirkonto 682117-7 (Stokholmo).* Membrokotizoj: NLG 22 por landoj en A-kategorio, NLG 20 por landoj en B-kategorio (laŭ UEA-divido). Simpla abono sen membreco (por E-societoj, bibliotekoj k.s.): 30 NLG. Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj eĉ internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas.

Alia pagmaniero estas al UEA: **UEA**, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĝk 37 89 64. UEA akceptas kredit-kartajn pagojn. Klare indiku la celon de la pago kaj la internan konton de ILEI: *ilek-a.* aŭ por *Juna amiko*: *juna-l.* Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri la enpago. Membreco: 20 NLG en landoj sen sekcioj, 25 NLG en landoj kun sekcioj.

KONTRIBUAĴOJ AL IPR

Kontribuajoj al IPR estu laŭeble nete tajpitaj per nigra rubando sur blanka papero kun adekvataj marĝenoj, taŭga por aŭtomata komputila enlego, aŭ surpapere prespretaj. Livero sur IBM PC-kongruaj disketoj (5,25 aŭ 3,5 colaj) bonvenas. Retadreso de la redaktoro: nlalt@konyvtar.c3.hu. Retadreso de la vicredaktoro: smidik@rik.bdtf.hu. Ili ambaŭ povas akcepti ankaŭ faksojn per komputilo, sed avertu ilin telefone antaŭ ol vi faksas. Telefon- kaj faksnumeroj: (+36-89) 315-836 (red.) kaj (+36-94) 320313 (vicred.). Fakaj artikoloj prefere ampleksu 3 ĝis 8 presitajn paĝojn. Pedagogiaj novaĵoj, informoj pri edukaj aranĝoj, interŝanĝaj gazetoj kaj leteroj al la redakcio bonvenas.

Ni recenzas nur ricevitajn eldonaĵojn iel rilatantaj al edukado aŭ utilaj en instruado.